

**Al ĉiuj legantoj
ni deziras bonan
kaj sukcesoplenan
Novan jaron**

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumentoj
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)
Aperas trifoje jare

Ĉefredaktoro: d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana Šundeke, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

Originala poezio

Senka Tomić

TRAJANJE

Ja pokrećem
Noć i Dan
a dan me lomi

Ja svanjavam
Jutro u sebi
jutrom u borbi

Ja postajem
nedostatna Večitom
Sada
ostajem
samo Nada

DAŬRO

Mi ekmovas
Nokton kaj Tagon
sed tago rompas min

Mi tagigas
Matenon en mi
matene en batalo

Mi estiĝas
malesta al Eterna
Nuno
restante
nur Espero

HARMONIJUM

Hoće li me primiti noć
hoće li me zagrliti
Ili će me izbaciti na obale
ostavljenih
prepuštenih besmislu

Hoće li me primiti ovo jutro
hoće li me zagrliti
Ili će me izbaciti na obale
preplavljenih
prenadanih bića u pokretu

Hoće li me prihvatiti
Tvoja ruka
koja sve vodom u
vodu slaže
nemirom moga srca
koje te zove
u traženju



HARMONIUMO

Ĉu nokto enprenos min
ĉu ĝi min brakumos
Aŭ elĵetos min sur bordojn
de forlasitoj
ceditajn al sensenco

Ĉu mateno enprenos min
ĉu ĝi min brakumos
Aŭ elĵetos min sur bordojn
de inunditaj
sopirantaj estaĵoj en movo

Ĉu min akceptos
via mano
kiu ĉion per akvo
en akvon surmetas
per maltrankvilo de mia koro
kiu invokas vin
serĉante

HAJKO-POEZIAĴOJ

Unu, du, tri
bonaj amikoj
fariĝis ni.

Al mi plaĉas Esperanto
diras fiere komencanto.

Kun amikaro ni kafumas
post lecionoj, vikle kune
tra nova urbo ofte zumas.

Kiam suno subiĝas
larmokule, per belaj
salutvortoj ni disiĝas.

РОЂЕНДАН

Године као река теку,
ушће је све ближе.
Да ли ме то бела коса
подсећа да крај стиже?

Био сам лептир пролећни
летео са цвета на цвет,
сада ме рођендан подсети
да вечан није ми лет.

Ведроме дану отима ноћ
лепоту, плавет и сјај
светлуцају ивице заборава
стиже време за опроштај.

NASKIĜTAGO

Jaroj fluas kiel rapida rivero
Fluo estas pli trankvilema
Komencis blankiĝi mia haro
Mi konscias ke ĉio pasema.

Printempa papilo mi estis
mi flugis de floro ĝis floro
naskiĝtago min ekpretis
de mi – restos rememoro.

De bela tago nokto forportas
belecon, serenecon kaj lazuron
briletas rando de forgeso
por foriro alvenas ordono.

Tradukoј

Ранко Крстајић

МИРИС ДИВЉЕ РУЖЕ

Када је Арсеније Мрдак устао иза писаћег стола и отишао да затвори прозор, почињао је да дува хладан ветар. Још од јутра болела га је глава па је често устајао и нервозно шетао по соби. Све време имао је осећај да га неко посматра. И заиста, док је покушавао да затвори прозор, учини му се да виде једну силуету која брзо нестаде у жбуњу испред ограде у дворишту.

Данима је непрекидно радио на рукопису романа, који је давно започео. Мучио се више него обично. Љутио се на све што га окружује. Можда му се због напетих нерава све то само привиђа – мислио је.

Још једном је пажљиво осмотрио жбуње испред прозора, али не примети ништа необично, само су гране јоргована лагано подрхтавале на ветру. Неко време остао је налакћен на доклат удишући пуним плућима, али је још увек осећао ону исту нелагодност – нелагодност од нечијег скривеног погледа.

Онда се сетио да га тај чудни осећај прати од самог повратка у село, у стару родитељску кућу. Испочетка је мислио да је преморен, да му се то само чини, да уображава, али сада је био сасвим убеђен да га заиста неко посматра из прикрајка, и да му се тај неко дотиче срца необичном стрепњом.

Арсеније Мрдак, угледни књижевник, био је омиљен и цењен у књижевним круговима. Књиге су му донеле велику славу и бројна признања. Пропутовао је цео свет, "бежећи од самога себе", како је у шали волео да каже. Најзад, помало разочаран и уморан, вратио се у село с чврстом намером да заврши један давно започети рукопис.

Село се беше сасвим изменило. Било је много мање него што му је остало у сећању. Куће су биле старе, ниске и дотрајале, и чинило се да полако зарастају у папрат и шуму. Свуда околу осећао се тежак мирис трулог дрвета и кравље балеге.

Мештани су га дочекали веома хладно и сумњичаво. Жене су се склањале испред њега, а мушкарци су га гледали са чуђењем, и неверицом, као да се плаше његове памети и његовог господског држања. Гордост која је често прерастала у охолост, и његов цинични, готово подругљиви осмех држао их је на одстојању.

Називали су га ученом будалом и развратником. Зато је све мање осећао потребу да излази.

Сатима је нервозно шетао по соби непрестано се сударајући са невидљивим намештајем који је постојао само у његовом сећању, а који сада труне у шупи и на буњишту, у дну баште. На сваком кораку, сама од себе, отварала би се ниска вратанца на расушеном ормару, а у многобројним мутним огледалима назирале су се меланхоличне слике једног давно изгубљеног времена. Сваким новим кораком даске на поду извлачиле су му из сећања давно заборављене гласове, и све је у њему стварало мучан и нелагодан осећај, као да је негде оставио упаљену цигарету, или неиспијену чашу омиљеног пића.

Многе ствари још су биле на старом месту: мала сталажа од јелове даске, невешто офарбана у зелено, црни гвоздени шпорет сав нарастао у рђу и чађ, дрвени кревет у ћошку, прекривен црвеним покривачем, велика округла трпеза са столицама околу, слика непознатог свеца чији лик беше ишчилео и заувек отишао из потамнелог рама. С прозора се видела трула дворишна ограда на којој је бршљан ткао зелену чипку свог сопственог времена. Стари дечији бицикл у агонији је умирао у трави. Био је то далеки пејзаж његовог детињства, опустошеног смрћу родитеља.

Онда је из тих слика изронила једна дивна успомена, један драги лик, неоштећен и заувек истргнут из времена. Лик младе девојке, Даре, једине коју је истински волео. Била је то његова прва, искрена и чиста љубав, какву никада касније није доживео.

Била је то најдубља рана у његовој души, од које никуда није могао да побегне, и која никада није могла да зарасте.

На озареном лицу беше му се заледио осмејак давно минуле среће, коју је заувек изгубио у вртлогу времена, среће коју није умео да препозна, и коју није знао да сачува. Узалуд је касније лутао светом поново покушавајући да је нађе, а она је све време била ту, поред његове куће, чекала га, стрепела, и надала се.

Како су брзо прошле године, како је пролетело време. Сва лепота живота ишчиљела је и нестала, као песак између прстију. Остао је само један драги лик у сећању, само једна давна успомена.

Застао је поред прозора привучен пурпурним руменилом залазећег сунца. Кроз младе гране јоргована у башти проматрала су га два невидљива ока. Учини му се да између зелених грана промину нечије лице, које брзо потом нестане у лишћу.

То је она – помисли Арсеније. Можда је дошла да га види, а нема храбрости да се покаже. Обрадован на брзину обуче јакну и истрча напоље.

У жбуњу јоргована није било никога, само су се гране нехајно њихале на слабом ветру. Доле у селу чуо се лавез паса, а сасвим

горе на врху падине, изнад његове куће, наслоњена руком на стабло брезе стајала је женска прилика мамећи га својом загонетком.

Озарен и устрептао од неког чудног узбуђења, какво одавно није осетио, Арсеније готово појури према првим стаблима брезове шуме која је почињала на врху падине.

Сав ознојен и задихан стиже на оно место где је малопре угледао прилику, али тамо више не беше никога. Само је трава поред стабла брезе била угажена, а на једној грани закачен тек убрани цветак дивље руже.

Арсеније додирну цвет и уздрхта. Нема сумње да је то била Дара. Тај цвет је она највише волела. Позната и драга игра скривалице, све више га је омамљивала и узбуђивала, али у исто време у срце су му се увлачише слутња и неверица.

Кад је дошао до даха и мало се одморио, он крену даље, као давно навијена опруга која одједном почиње да одмотава своју нит, провлачећи се између повијених грана и полегле папрати, пратећи неки невидљиви, само њему познати траг. Убрзо изби на једну зараван, зараслу у траву и закржљало трње купине, на чијој се средини уздизао огромни стари храст.

Арсеније застаде. Срце поче да му лупа као сумануто. Лице му озари радост. То је било њихово омиљено састајалиште. То је било њихово тајно место.

Прилазио је храсту полако, као драгом пријатељу кога одавно није видео, и за кога је мислио да га можда више никада неће видети. Он седе испод храста, наслони се на стабло и затвори очи. Кроз пуцкетање сувих гранчица, до срца му се проби једва чујан и нежан уздах.

Она ће се сада пришуњати – мислио је. Ставиће му руке на очи, сачекати мало, а онда, не могавши више да се суздржи, почеће да се смеје и да га љуби. Зауставио је дисање и чекао, чуо је како му срце лупа, и осетио је у души оно исто узбуђење, као онога дана када је одлазио, а њој није рекао да ће отићи. Није се ни опростио. Није јој дао ни лажну наду да ће се вратити. Знао је да би га она чекала до краја живота, само да јој је бар једном рекао да ће се вратити.

Али време је пролазило а она се није појављивала. Ништа се није чуло. Чак је и ветар престао да дува. Арсеније осети непријатност, и би му криво што је дозволио себи да испадне будала. Па наравно да неће доћи. Она је сада удата, има мужа, има децу, и није више млада.

Сунце је већ зашло и небо се црвенело као крв. Арсеније није устајао. Затворених очију лежао је прислоњен уз храст покушавајући да одагна изненадни бол у срцу. Хладни мрави пели су му се уз кичму, и нестајали у понору душе.

A kad je ponovo otvorio очи, podigavši glavu da удахне ваздух, изнад себе, кроз црвенило неба, поглед му паде на једну оголелу грану, са које је висео крајичак давно пререзаног, већ иструлелог конопца.

Ranko Krstajić

ODORO DE SOVAĜA ROZO

Kiam Arsenije Mrdak ekstaris de ĉe la skribotablo kaj foriris fermi la fenestron, komencis blovi malvarma vento. Jam dematene lin doloris la kapo kaj li ofte ekstaradis kaj nerveme promenis tra la ĉambro. Dum la tuta tempo li sentemis ke iu observas lin. Kaj vere, dum li provadis fermi la fenestron, ekŝajnis al li vidi unu silueton, kiu rapide malaperis en arbustaron antaŭ la ĉirkaŭbarilo en la korto.

Dum tagoj li laboradis je manuskripto de la romano kiun li delonge ekkomencis verki. Li penis pli ol ordinare. Li koleris je ĉio kio ĉirkaŭis lin. Eble pro streĉitaj nervoj, ĉio ĉi nur li halucinas – pensis li.

Ankoraŭfoje li atente observis la arbustaron antaŭ la fenestro, sed rimarkis nenion neordinaran. Nur branĉoj de siringo malrapide tremetadis je la vento. Iun tempon li restis kubute sinapoginta sur la altano enspirante per plena pulmo, sed ankoraŭ sentis tiun saman malagrablecon – malagrablecon pro ies kaŝita rigardo.

Tiam li ekmemoris ke tiu stranga sento lin akompanas jam ekde lia reveno en la vilaĝon, en la malnovan gepatran domon. Komence li pensis ke li estas laca, ke tio nur ŝajnas, ke li halucinas, sed nun li estis tute konvinkita ke lin vere iu observadas el kaŝangulo, kaj ke tiu iu tuŝadas lian koron per neordinara timfebro.

Arsenije Mrdak, eminenta verkisto, estis populara kaj respektata en rondo de verkistoj. Liaj libroj igis al li grandan famon kaj multnombrajn rekonajn. Li travojaĝis la tutan mondon, "fuĝante de si mem", kiel li ŝerce ŝatis diri. Fine, iomete seniluziiganta kaj laca, li revenis en la vilaĝon per firma intenco – fini antaŭlonge komencitan manuskripton.

La vilaĝo komplete ŝanĝiĝis. Ĝi estis pli malgranda ol kiel ĝi restis en liaj rememoroj. La domoj estis malnovaj, malaltaj kaj eluzitaj, kaj ŝajnis, ke ili malrapide enkreskadas en filikon kaj arbaron. Ĉie ĉirkaŭe sentiĝis prema miasmo de putra ligno kaj bovinfekaĵoj.

La lokanoj akceptis lin tre malvarme kaj suspekteme. Virinoj retiriĝadis antaŭ li, kaj viroj rigardis lin mire, kaj nekredeme, kvazaŭ ili timus lian menson kaj lian sinjorecan sintenon. Fiereco, kiu ofte

transiĝadis en orgojlon, kaj lia cinika, mokema rideto tenis ilin je distanco. Ili nomadis lin klera malsaĝulo kaj diboĉulo. Pro tio li ĉiam malpli multe sentis bezonon aperadi.

Dum horoj li nerveze promenadis tra la ĉambro senĉese interpuŝiĝante kun nevidebla meblaro kiuj ekzistis nur en lia rememoro, kaj kiu nun putras en hejtlignejo kaj je rubejo en la fina parto de ĝardeno. Je ĉiu lia paŝo, la malalta pordeto de sekiĝinta ŝranko malfermiĝadis, per si mem, kaj en multnombraj malklaraj speguloj duonvidiĝis melanholiaj bildoj de la jam delonge perdita tempo. Je ĉiu nova paŝo bretoj de planko eltiradis el lia rememoro antaŭlonge forgesitajn voĉojn, kaj ĉio tio igadis en li penigan kaj malagrablan senton kvazaŭ li estus ie lasinta ekbruligitan cigaredon aŭ glason da nefintrinkata prefera trinkaĵo.

Multaj aĵoj estis sur la malnovaj lokoj: malgranda ŝranketo el abiaj bretoj, mallerte kolorigita per verda farbo, nigra fera kuirforno tute superŝutita per rusto kaj fulgo, ligna lito en angulo, surkovrita per ruĝa litkovrilo, granda ronda manĝotablo kun seĝoj ĉirkaŭe, pentraĵo de nekonata sanktulo kies vizaĝo malheliĝis kaj por ĉiam foriris el la nigriĝinta kadro. De la fenestro oni vidas putriĝintan kortan barilon je kiu hedero teksis verdan punton de sia propra tempo. Malnova porinfana biciklo en agonio mortantis en herbo. Estis tio malproksima pejzaĝo de lia infanaĝo, dezertigita per morto de la gepatroj.

Tiam el tiuj bildoj elmergiĝis iu belega memoraĵo, iu amata vizaĝo, sendifekta kaj por ĉiam eltirita el la tempo. Vizaĝo de juna fraŭlino, Dara, la unusola kiun li vere amis. Tio estis lia unua, sincera kaj pura amo, amo kian li neniam poste ĝisvivis.

Tio estis la plej profunda vundo en lia animo, de kiu li povis nenien forfuĝi kaj kiu neniam povis malestiĝi.

Kie ŝi estas nun? Ĉu ŝi edziniĝis? Aŭ ŝi naskis infanojn? Ĉu ŝi ankoraŭ rememoras lin?

Sur lia radianta vizaĝo glaciigis rideto pro la longe forpasinta feliĉo, kiun li por ĉiam perdis en la vortico de la tempo, de la feliĉo kiun li ne scipovis rekoni, kaj kiun li ne sciis konservi. Vane li poste vagadis tra la mondo, denove provante trovi ĝin, kaj ĝi tuttempe estis tie, apud lia domo, atendadis lin, timtremis kaj esperis.

Kiel rapide forpasis jaroj, kiel forflugis la tempo. La tuta beleco de la vivo forŝrumpis kaj malaperis kiel sablo tra la fingroj. Restis nur unu kara figuro en rememoro, nur unu delonga memoraĵo.

Li ekhaltis apud la fenestro altirita per purpura ruĝeco de la subiranta suno. Tra la junaj branĉoj de siringo en la ĝardeno observis lin du nevideblaj okuloj. Ekŝajnis al li ke inter verdaj branĉoj trapasis ies vizaĝo, kiu poste rapide malaperis en foliaron.

Tio estas ŝi – ekpensis Arsenije. Eble ŝi alvenis vidi lin, sed ne kuraĝas montri sin. Ĝojgite, li rapide surmetis jakon kaj elkuris eksteren.

En la arbustaro de siringo estis neniuj, nur branĉoj indiferente luliĝis je la malforta vento. Malsupre, en la vilaĝo, aŭdiĝis bojado de hundoj, sed tute malsube, sur la supro de la deklivo, super lia domo, apogita sur la trunko de betulo, staris virina figuro logante lin per sia enigmo.

Radiante kaj ekstremitate de iu miriga emocio, kian li delonge ne sentis, Arsenije preskaŭ ekkuregis al unuaj trunkoj de betula arbaro kies komenco estis sur la supro de la deklivo.

Plenŝvita kaj spirperda li alvenis al tiu loko kie li ĵus ekvidis la figuron, sed tie nun estis neniuj plu. Nur herboj apud la trunko de la betulo estis sutretitaj, kaj sur unu branĉo estis alkroĉita apenaŭ plukita floreto de sovaĝa rozo.

Arsenije ektuŝis la floron kaj ekstremitate. Sendube tio estis Dara. Tiun floron ŝi plej multe ŝatis. Konata kaj kara ludo de kaŝado pli kaj pli ravadis kaj emociadis lin, sed samtempe en lian koron eniĝadis konjekto kaj nekredemo.

Reveninte al spiro kaj malmulte ripozinte, li ekiris pluen, kiel delonge streĉita risorto kiu subite komencas malvolvadi sian fadenon, traŝante inter fleksitaj branĉoj kaj kuŝiginta filiko, akompanante iun nevideblan, nur al li konatan spuron. Baldaŭ li eliris sur la altebenaĵon subkovritan per herboj kaj atrofia rubusdornaro, sur kies centro staris grandega maljuna kverko.

Arsenije haltis. Lia koro komencis furioze batadi. Lia vizaĝo ekradiis per ĝojo. Tio estis ilia prefera loko de rendevuoj. Tio estis ilia sekreta loko.

Li aliradis la kverkon malrapide, kiel karan amikon kiun li delonge ne vidis kaj pensis ke li eble neniam vidos lin. Li eksidis apud la kverko, apogis sin sur la trunko kaj fermis la okulojn. Tra la kraketado de sekaj branĉetoj penetris ĝis lia koro apenaŭ aŭdebla kaj subtila suspiro.

Ŝi nun kaŝe alproksimiĝos – pensis li. Ŝi metos la manojn sur liajn okulojn, atentos malmulte kaj poste, ne povante plu sin deteni, ŝi komencos ridi kaj kisadi lin. Li haltigis la spiradon kaj atendis, aŭdis kiel lia koro batas kaj eksentis en la animo tiun saman emocieton kiel tiun tagon kiam li forirantis, kaj al ŝi ne diris ke li foriros. Li eĉ ne adiaŭis. Ne donis al ŝi eĉ falsan esperon ke li revenos. Li sciis ke ŝi atendus lin ĝis la fino de la vivo, nur se li estus almenaŭ dirinta al ŝi ke li revenos.

Sed, la tempo pasadis kaj ŝi ne aperadis. Nenio aŭdeblis. Eĉ la vento ĉesis blovi. Arsenije eksentis malagrablegon, kaj malplezuris ke li

permesis al si estiĝi stultulo. Nu, kompreneble, ŝi ne alvenos. Nun, ŝi estas edziniĝinta, havas edzon, infanojn, kaj ne plu estas juna.

La suno jam subiris kaj la ĉielo ruĝis kvazaŭ sango. Arsenije ne leviĝis. Kun fermitaj okuloj li kuŝis apogita al la kverko provante forigi subitan doloron en la koro. Malvarma svarmjuketado supreniradis laŭlonge de lia spino kaj malaperadis en abismon de la animo.

Sed li denove malfermis la okulojn, levinte la kapon por enspiri aeron, supre de lia kapo, tra la ĉielruĝo, lia rigardo trafis iun nudiĝintan branĉon de kiu pendis finpeco de delonge tratranĉita, jam putriĝinta ŝnurego.

(Tradukis Dimitrije Janičić)

PRI LA AŬTORO

Ranko Krstajiĉ naskiĝis en la jaro 1952 en Ŗabljak (legu: Ĵabljak), Montenegro. Finstudis filologian fakultaton en Beogrado. En mondo de serba literaturo aperis meze de okdekaj jaroj kaj okupas altan lokon inter modernaj verkistoj.

Eldonitaj libroj:

Hazardo de sinjoro Asimov (1984 kaj 1996)

Noktoj de nigra luno (1988)

Antologio de monda fantasta literaturo (1989)

Ombroj en nebulo (1994).

Apud literatura laboro Krstajiĉ estas konata pentristo. Ĝis nun li havis 17 memstarajn ekspoziciojn en lando kaj eksterlando.

Li vivas kaj laboras en Beogrado.



ПРИЧАЛИ МИ МОЈИ СТАРИ СОЛУНАЦ

Мноћи ратови овуј нашу земљу, овуј Србију, стревували.
Каквеј ју свеј војеће несугазиле, палиле, арачиле, рушиле, убивале;
И кој знае који ће јоште на Србију да насрне.
А наши љуђе свагда умели да ју бране.
Разврљаше српће косће на све стран.
И Љуба отиде у рат.
На Солунећи фронт.
Остаји ситну дечију и Марину.
Прооде дни.
Страуе се.
Ослушкује.
На врата очи изглецује.
На туђи кораци зарадује и уздањује.
Аброви не дооде.
И дечија башту забораше.
Де кој стран наиде, трчу.
Велу, башта иде.
Почесе да се врчају редови.
Дојде домишљар, наредник Таса, Диса...
Љуба не дооди.
Нит дооди, нит кој од њег ич знае.
Никој абар од Љубу но донел.
Диса дошал на белога коња.
Проз село кој ђенерал прооди.
Зазр се у њег Марина.
Забораше и она Љубу.
– Не лудуј, ћерко. Сас Љубу дечију имаш. Друђи башта не мож да им буде. Не брукај и – саветује Малина, Маринина мати.
– Е, нано. Дечија порасту, пут свој најду и отиду. А ја, куде ћу ја после? Кој ће мен после да гледа стару и никакву? Кој ће водицу да ми принесе?
И отиде Марина.
Отиде на тај нов, трновит пут.
Отиде за Дису.
Од дечију, при себ узе Даницу.
Раде остаји на деду и бабу.
Да им ране зацели.
Да полак сина преболују.

Да им огњиште дочувује.
– Е, де ли и косће остајил, сине? Да ли ти је гроб? – уздањује
Љубина мати Марија.
Слзе вишс не има.
Отекоше у "Плаву гробницу".
Јесли там његов гроб?
Јесли там косће остајил?



Dragica Milenković

Rakontis al mi miaj oldaj
Popolfrontanto de Tesaloniko
(serbe: **SOLUNAC**)

Multaj militoj ĉi nian landon, ĉi Serbion trafadis.
kiaj soldataroj ĝin ne tretis, bruligadis, forrabis, detruis kaj mortigadis.
kaj kiu scias kiuj ankoraŭ agresie Serbion perfortados.
Kaj niaj popoloj ĉiam scipovis defendi ĝin.
Elfosigitaj serbaj ostoj je ĉiuj flankoj.
Kaj Ljuba foriris en militon.
Al Tesaloniko-fronto.
forlasis li infanetojn kaj Marinan.
Pasis tagoj.
Ili timigitaj,
Oni aŭskultas
al pordo okuloj direktiĝas.
Je fremdaj paŝoj oni ĝojas kaj sopirĝemadas.
Heroldoj ne alvenas.
Kaj infanetoj patron forgesis.
Kiam ajn iu fremdulo alvenas, ili kuras.
Ili diras, patro iras.
Komenciĝis revenantoj sinsekvi.
Revenis spritulo, ĉefserĝento Tasa, Disa...
Ljuba ne venis.
Nek li venas nek iu pri li ion scias.
Neniŭ novaĵon pri Ljuba portas.
Disa venis sur blanka ĉevalo.
Trapasis li vilaĝon, kiel generalo li trairas.
Ekrigardis pasiete lin Marina.
Eĉ ŝi forgesis Ljuban.
Ne frenezu, filino. Kun Ljuba infanetojn vi havas.
– Alia ilia patro ne povas esti. Ne kompromitu ilin – konsilas patrino de
Marina, Malina.
– Ho, panjo! La infanetoj elkreskos, siajn vojojn trovos, kaj foriros. Kaj mi,
kien mi iros poste. Kiu poste zorgos pri mi maljuna kaj nenia? Kiu akvon
portos al mi?
Kaj foriris Marina. Foriris ŝi al tiu nova dorna vojo.
Edziniĝis ŝi al Disa.
El infanetoj, ĉe si, prenis ŝi knabinon Danica.
La knabon, Rade, ŝi forlasis ĉe avo kaj avino
por ke li vundojn sanigu al ili.
Por ke ili malrapide filon trasuferu.
Por ke li hejmfajrujon ĝisgardu al ili.

– Ho, kie vi la ostojn restigis, filo: Kie estas via tombo – sopiradis patrino
de Ljuba, Marija,
Larmoj ne plu ĉeestas.
Defluis ili en „Bluan tombejon“.
Ĉu estas tie lia tombo?
Ĉu tie ostoj liaj forlasitaj estas?

(El la serba, sed en torlaka – dialekta – origino esperantigis Mirić Jadranka)

Klarigo. *Poemon „Blua tombo“ verkis Milutin Bojić. La poemo estas dediĉita al serbaj soldatoj, kiuj pereis dum retiriĝo tra Albanio en la Unua mondmilito. La mortintajn serbajn soldatojn oni ĵetadis en bluan Jonan maron.*



Simo Matavulj (1852-1908)

BAKONJA FRAT'-BRNE **(Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(kvara parto)

Sur ĉiu estis pantalono, felveŝto kun arĝentaj butonoj kaj drapsurtuto borderita per pasamento, ĉio el nigra drapo, kaj bunta zono kaj plata ruĝa ĉapeto. Tiel sin vestas komercistidoj en dalmataj urboj kaj pastraj lernantoj, ĝis kiam ili "enrobiĝos". (Enrobiĝi, en ilia parolo, signifas – ekporti sutanon).

–Li iĝos pli bona ol vi pensas! – diris la monakejestro leviĝante. Poste li aliris lin kaj karesfrapis perfingre lian vangon.

–Ĉu vi vere estos bona, he?

Korpulentulo liberiĝis, ekrigardis malkaŝe la maljunan dikventrulon kaj ripetis kion li estis ellerninta de Stefano:

–Mi estos obeega, respektegata patro!

–Nu, bele! Iru nun kun tiuj lernantoj. Kunirigu vi lin!

Korpulentulo trairis kun la lernantoj la volbigitan enirejon, tuj troviĝonte en la korto, kie li vidis ke la monakejo estis masonita kiel simile al muldilo. Unu flankon ampleksis la preĝejo, kaj antaŭ tri flankoj estis larĝa vestiblo, apogita per kolonoj. La vestiblo estis kovrita per bretoj, platoj, brikoj – disloke. Inter la vestiblo-tegmento kaj tegmento de la tuta konstruaĵo, je multaj lokoj, fumo postlasis flavajn striojn.

Du ŝtonaj ŝtuparoj, konsistigitaj el plumpe tranĉitaj ŝtonoj, kondukis al la vestiblo. Laŭlonge de la vestiblo, la pordoj de ĉeloj kaj aliaj ejoj estis malegalaj kaj diverse kolorigitaj. Inter unuj kaj la aliaj troviĝis konkavaj niĉoj, en kiuj estis multaj sanktulaj statuoj, rompitaĵoj, ĉifonoj ktp. La planko de la vestiblo-tegmento estis kovrita parte per bretoj, parte per plataĵoj. Turnirinte la alian vestibloflankon, Korpulentulo vidis enangule iun etan ŝtuparon similan al borilo; ĝi ĝenis trairon, sed nenien kondukis, ĉar la iama truo malantaŭ ĝi estis enmasonita. Je la tria flanko li trovis eĉ pli grandan kaoson. Tie estis fenestroj, kie pli konvenus pordoj, kaj inverse. Fine li venis ĝis la fino.

Tiel traire ili trarigardis la monakejon. Hirtulido elkalkulis ke en tiu domo ekzistas kvardek ejoj, kaj se oni al tio aldonas subtegmenton kaj kelon, tiam povus enmonakejiĝi preskaŭ la tuta Zvrļjevo-vivantaro.

Du diakonoj turniris maldekstren, tra la grandan pordon super kiu estis ikono kaj lucerno. Korpulentulo pensis ke post tiu pordo estas iu

sanktaĵo, sed tra ĝin aliradis tiu "dolĉaromo" alvenanta el la monakeja kuirejo.

–Ĉu vi ja estis iam ĉi tie? – demandis lin iu etulo, postkiam oni restis kun li en la vestiblo.

–Kaj kiel oni nomas vin? – demandis la alia.

–Mia nomo estas Ive, – respondis Hirtulido.

–Sed oni vin nomas Korpulentulo! – aldonis la tria ridante.

La alnomo de via patro estas: Hirtulo; de la patrino: Vespulino; de unu frato Kadukulo; de unu fratino: Vitriolo, de la alia: Kurbulino; de la plej aĝa frato: Ventregulo. Kaj viajn onklojn oni nomas: Hokstango kaj Nazsonulo. Diru, ĉu ne estas tiel.

Kaj ĉiuj plezure ridis.

–Kaj kion vi faradis hejme?

–Li paŝtigadis kaprojn! Kaj ĉi tie vi paŝtigos anserojn, ĉu vi komprenas? Kaj ne estas facile gardi anserojn, fraĉjo! Antaŭ ĉio endas ĉiun alnomo, ĉar neniu matene eliros ĝis kiam vi nomvokos ĝin. Poste vi devas antaŭiri ilin ĉi tiel (montrante kiel li balanciros), kaj se iu forfuĝas laŭ riverfluo, vi devas iri laŭborde ĝis kiam vi ĝin revenigos.

Post tiuj instrukcioj ili eniris post la diakonoj. Ili eniris vastan ĉambregon, en kiu estis granda tablo. Malantaŭ la tablofrunto, surmure troviĝis la krucumita Jesuo, nuda kaj ne malpli granda ol Hirtulo. Sur la alia muro pendis bildo prezentanta aron da homoj kiuj sidas ĉetable. Ĉiuj estis vilaj kaj ĉiuj, escepte de unu, havis iujn lumajn aŭreolojn ĉirkaŭkape. Antaŭ tiu bildo estis pupitro kaj sur ĝi malfermita libro.

Korpulentulo kun siaj kamaradoj pasis en malpli grandan ĉambron, kie troviĝis malpli granda tablo kun malnovmodaj benkoj, kaj surmure bretaroj plenaj je teleroj kaj pelvoj.

De tie ili eniris la kuirejon.

Antaŭ alta fajrejo staris pli maljuna monako, verŝante supon tra fera filtrilo. Al Korpulentulo ekŝajnis strange, ke la monako faras tiajn laborojn; li ĝisatendis ĝis kiam tiu mallevis poton, kaj aliris kaj kisis subite lian manon.

Diakonoj kaj lernantoj ekridegis.

La kuiristo konfuziĝis kaj demandis la knabon:

–Kiu vi estas? Kiun vi serĉas?

–Mi estas nevo de frat'-Brne.

–Ha! Tiel! Estu vivsana... Vidu... jen... mi ne estas monako, sed laiko,... sed tamen, estas bele respekti pli maljunajn... laŭ jaroj mi povus esti al vi patro... Kaj kial vi ridantas? Impertinentuloj! ekkriis li al lernantoj. Ĉu estas strange ke la knabo kisis mian manon! Surkapigu la ĉapon, infano, surkapigu! Mia nomo estas Grgo, vi nomos min "sinjor'-Grgo". Kondu tu bele kaj mi en ĉio instrukcios vin. Sed, antaŭ ĉio, ne estu kiel ĉi tiuj kamaradoj. Iru nun tien, ripozu.

Korpulentulo, konfuzita, revenis en la antaŭan ĉambron, kie estis tiuj kvin, kaj ili rekomencis inciteti lin.

–Kial vi ankaŭ mian manon ne kisis, ha, anseristo? – demandis lin, preskaŭ severe, iu kurbiĝinta lernanteto, tri-kvar jarojn malpli juna ol li.

–Ne faru ĉiam la saman ŝercon kun la knabo! – diris la alta, malsaneta diakono, kiu pene piedstaris.

–Jen frat'-Tetka! Ni fuĝu! – ekkriis la plej juna, kaj ĉiuj eliris escepte de Korpulentulo, kiu ekmiris vidante la monakon kiu sidis apud la onklo. Do, tio estis frat'-Tetka (Onklin').

–Ĉu tio estos baldaŭ preta, Grgo? Ĉu vi enverŝis supon?

–Ne ankoraŭ, patro, respondis Grgo malbonhumore.

–Diablo vin forigu, ĉu mi diris al vi ke la monakeja horloĝo malfruas! Jen estas jam tagmezo! Kaj Tetka kolere eliris.

Korpulentulo aliris la fenestron kaj ekvidis vastan ĝardenon malantaŭ la monakeja kontraŭflanko. Post ĝi estis vico da malgrandetaj konstruaĵoj. Antaŭ unu el ili oni hufoferis ĉevalon. Tie estis ariĝinta amaso da servistoj, inter kiuj li rekonis Stefanon. Malantaŭ tiuj domoj etendiĝis herbejeto, kaj tuj malsupre de ĝi fluis rivero, pli larĝa ol je la alia insuletflanko. Transrivere etendiĝis ebenaĵo, kaj post ĝi alternas montoj, ĉirkaŭitaj de vinberejoj kaj olivejoj. Ĉio ĉi estis belega dum la serena aŭtuna tago, kaj la okuloj de Korpulentulo flugrigardis je ĉiuj flankoj ĝis kiam ili haltis je branĉaro de iu trunko meze de la ĝardeno.

–Jesuo mia! Kio povas esti tio? demandis Korpulentulo sin mem farinte grandajn okulojn.

Li rimarkis ke tio estis longa birdvosto, kaj je ĝia finaĵo, sur lumaj plumoj, en oraj rondetoj, iuj bluaj makuloj. Tiumomente promenekiris en la ĝardenon frat'-Tetka, kaj kiam li ekestis subarbe, tiu birdo eklekis super li, kiu kaptprenis terbulon kaj ĵetis ĝin supren, pro kio la birdo surteriĝis kaj ekkuris per siaj mallertaj longaj piedoj, dum en ĝia kurado ŝanceliĝis ĝiaj maldika kolo kaj surkape malgranda plumtufo. De ie alkuris al ĝi grizaj kaj senvestaj kokinoj, kiuj faris: gr-gr-gr-gr...

Korpulentulo eniris la kuirejon.

Mi petus vin, sinjor'-Grgo, pri unu vorto, – diris Korpulentulo kaj nevole ekfrandis ekrigardinte la rostaĵon.

–Kion vi volas, knabo?

–Kiel nomiĝas tiu birdo kun la ora vosto? Jen ĝi en la ĝardeno.

–Tio estas pavo. Iru nun.

–Kaj tiuj aliaj senvestaj?

–Tio estas numidoj. Iru nun.

–Pavoj kaj numidoj, – ripetis Korpulentulo, sidiĝinte denove. Ĉio estas ĉi tie stranga, ĉio! Pro tiu pavo mi ricevis ĉi-matene la vangofrapon de la onklo! Kaj jen ĉi tie ankaŭ kuiristo portas monakan veston, kaj oni diras ke li ne estas monako! Kaj de kie ja tiuj friponoj scias la alnomojn

de miaj paĉjo, patrino kaj de la aliaj? Ĉu Stefano diris tion al ili? Ĉu Stefano estas fripono?

Kun tiu konjekto Korpulentulo klinis la kapon kaj endormiĝis surbenke.

Post duonhoro vekis lin moviĝado en la monaka manĝoĉambro. Farinte preĝojn ili komencis movadi seĝojn, poste oni aŭdis tintadon de ujaro kaj nazmurmuradon. Korpulentulo alproksimiĝis al la pordo kaj vidis tiujn du diakonojn antaŭ la pupitro: unu legas, la alia sekvas perokule. Post kelkaj momentoj tiu alia eklegis kaj la unua komencis rigardi, ĝis kiam la monakejestro ekbabilis ion, je kio la diakonoj kliniĝis kaj ankaŭ ĉetabliĝis.

–Knabo Jerković! alvokis la kuiristo, sidiĝante fruntan de la alia manĝotablo, kaj sidigante Korpulentulon apud sin mem, dum tiuj tri lernantetoj iom deapudiĝis. Korpulentulo ekmanĝegis. La kompatindulo ne gustumis grasojn jam delongege kaj krome tiun tagon li piediradis kvar horojn. Kiel agrable li surpriziĝis, kiam, post du bonaj bovaĵpecoj, sinjor'-Grgo ofertis al li rostaĵon kaj salaton, poste unu piron, kaj poste plenan glason da vino.

En la monaka manĝoĉambro jen leviĝis tumulto, jen oni ridis kaj flustris, ĝis ili denove ekmovis la seĝojn, denove elparolis la preĝon, kaj eliris.

Grgo foriris en la kuirejon, kaj Korpulentulo kaŝe postiris lin, dirante flate:

–Ordonu ke mi ion helpu al vi, sinjor'-Grgo.

–Mi vidas ke vi estas bona infano, ke vi estas dankema, diris la kortuŝita kuiristo. Sed hodiaŭ vi helpos nenion al mi, ĉar vi estas laca, sed vi denove surbenkiĝu, ĉar ankaŭ la onklo foriris ripozi. Poste mi vekos vin kaj kunirigos por ke vi vidu preĝejon.

Korpulentulo revenis en la porlernantan manĝejon.

–Vi ja kvazaŭ ne ŝatas ĉi tiun nian vinon, diris tiu lernanteto kiu ankaŭ ĝis tiam incitetis lin, montrante la apenaŭ ektrinkitan vinparton de Korpulentulo. Li trinkklinis la glason, sed post unu glutporcio lia vizaĝo sulkiĝis kaj liaj okuloj eklarmis, post kio li eksvingis la glason kaj frapis la kapon de la trompemulo.

Tiu duopo saltatakis Korpulentulon, sed la forta Hirtulido tuj manfrapis la unuan kaj la alian.

Grgo alkuregis.

–Kio okazas? Kial vi interbatiĝas?

Korpulentulo prezentis al li la glason, kaj kiam Grgo ekflaris kaj rekonis ke oni ŝutis al li paprikon, ekkriis:

–Diablidoj, ĉu tiel oni akceptas kamaradon, ha? Bone vi faris, Jerković! Se oni akuzos vin, ne timu, ilin atingos pli dika bastonparto... Eliru tuj, aŭ mi tuj iros al la monakejestro.

Post ilia foriro, Grgo donis al Korpulentulo panmolaĵon por ĝin maĉi, kaj konsilis lin ekkuŝi, kion Korpulentulo tuj faris, rapide endormiĝinte, kvankam ankoraŭ ne sekiĝis larmoj sur liaj vangoj.

Grgo lasis lin tutajn du horojn, kaj poste kondukis lin en la preĝejon.

Al Korpulentulo ŝajnis ke li kvazaŭ estus tretinta sur lagon, tiel brulis ruĝaj kaj bluaj plankplataĵoj, same kiel la marmoraj ŝtupetaroj antaŭ sep altaroj. Kaj kio estas tio kompare kun la orumitaj kolonoj, kandelabroj, kadroj, lucerno, kompare kun la bildoj kaj statuoj kiuj ravas la okulojn de ĉiuj flankoj! Je randoj de la blankaj tablotukoj pendis la rozkoloraj punktoj. Grgo turnis lian atenton al korusejo, kie brilis orgentuboj kvazaŭ ili estus puroraj.

El la preĝejo Grgo kunirigis lin en la ĉevalstalon kie estis maĉantaj kvar bonaj rajdĉevaloj kaj kvar ŝarĝoĉevaloj. Tie restis ili konsiderinde longe, ĉar la ĉevaloj estis granda ŝato de Korpulentulo. El la ĉevalejo ili turniris al la tegmentaĵo kiu tiumomente estis malplena, sed Grgo diris al li ke tio estas ejo de ses melkbovinoj. De tie ili vizitis la muelejon, kie Korpulentulo konatiĝis kun la muelisto kaj forĝisto, kiuj ĉiam kompanis unu kun la alia. La forĝejo troviĝis je kelkaj paŝoj de tie.

Fine ili foriris en la novan porjunulan kuirejon.

Iam la servistoj nutradis sin en la monakejo, sed antaŭ dek jaroj la monakoj konstruis porjunulan domon malantaŭ la monakeja dorsflanko. Estis tio konsiderinde vasta konstruaĵo, dividita je trionoj; la mezo estis ĉirkaŭigita per la malalta muro, kies piede troviĝis la ŝtona almuraĵo, por sidado; apud unu el la muroj estis alkonstruita panbakejo; ĝuste plankmeze troviĝis du feraj apogaĵoj kie brulis fajro. Je la flankoj de tiu meza konstruaĵo estis du deponejoj: tenejo kaj laktejo. La tuta domo nomiĝis nova junulkuirejo. En la malnova junulkuirejo de la monakejo varmiĝadis vintre la monakoj, kaj la malnovan laktejon oni aligis al la sakristio.

Ĉion ĉi Grgo detale prirakontis al la nova lernanto kaj ankoraŭ multon, precipe tion kiel li venadas ĉiumatene kaj vespere por disdoni porciojn al la junuloj. Tion oni enkondukis de antaŭ dek jaroj, kaj tio estis tre bona laŭopinio de Grgo, ĉar la pli junaj ne tretadas en la monakejon.

Korpulentulo aŭskultis ĉion ĉi iom distre, ekde kiam li aŭdis en la nova junuldomo iun interparolon de du kuŝantaj servistoj, kiuj ne moviĝis eĉ kiam la kuiristo eniris. Korpulentulo klare aŭdis ke unu el ili diris:

–Je via Dio, kiu estas tiu ĉi knabo kun *Ekskrementulo*?

(–Do, sinjor’-Grgo-n oni nomas Ekskrementulo) – diris por si mem Korpulentulo.

Kiam alvenis tempo de vespermeso, Hirtulido aliĝis al la preĝejanĝulo. “Benadon” (vespermeson) servis frat’-Vostvolvulo. La ceteraj ses monakoj estis sidantaj flanke de la granda altaro. Du diakonoj genuis

iom pli-malpli proksime. El tri lernantoj unu estis en korusĉemizo, du aliaj estis servantaj. Do, ne ekzistis aparta sonorigisto aŭ sakristiisto.

Subite ekbruis la orgeno, kaj la hararo de Hirtulido hirtiĝis, ĉar ĝis tiam li ne aŭdis tian muzikadon. Li turniĝis por vidi kiu tion ludas, kiam dume

Tetka sidis antaŭ la orgeno kaj movadis la kapon.

La vespermanĝo pasis samorde kiel la tagmanĝo. La kamaradoj eĉ ne rigardis lin, des malpli incitetis lin. Oĉjo Ekskrementulo okulsignis al Korpulentulo, kvazaŭ volonte diri: Vi vidas ke firmaj manoj helpas ankaŭ en la monakejo pli ol la saĝo!

Post la vespermanĝo, Trogulo alvokis Ekskrementulon:

–Ho Grgo, kie ja estas tiu mia knabo? Miafide, mi eĉ forgesis lin. Ĉu li friponadis iel?

–Ne, pastreto, je mia kruco, sed kiel ŝajnas al mi, li estas ĝuste saĝa knabo.

–Tii-el! He, he, “ĉiu nova ĵusedzino estas brava!” Alvenigu lin poste al mi.

Ekskrementulo foriris Korpulentulon en la mezan vestiblon, kie Trogulo havis siajn du ĉambrojn kiel ĉiuj aliaj monakoj. En la antaŭa staris granda ŝranko kun libroj, kvar apogseĝoj, divano, kaj sur la muroj kelkaj bildoj kaj unu pendhorloĝo kun peziloj. Tra la alia pordo videblis la dormoĉambro de Trogulo, en kiu ankaŭ klaketis horloĝo formsimila al la unua. La kuiristo elportis el tiu ĉambro en la antaŭan la drapkovrilon, kovrilon kaj la ledan kusenon, kiun li transdonis al Korpulentulo. Dum li tion farantis, li kaj la monako parolis itale.

–Tii-el! diris fine Korpulentulo oscedante. Senŝuigu vin antaŭ la ĉambro, kaj poste vi ĉi tie ekkuŝu, kaj morgaŭ frue prenu tiun ujon kaj alportu akvon de l' fontano. Tio estas, unue vi sonorigu la vekilon kaj poste iru por akvo. Grgo jam diros al vi kie troviĝas la fontano. Kaj nun bonan nokton! – Brne enfermiĝis.

Grgo restis ankoraŭ iom da tempo por instrukcii la knabon, kaj foriris.

Korpulentulo rapide krucsignis, ekblovis al la kandelo kaj tuj endormiĝis kvazaŭ buĉita.

Ĉio ajn plektiĝis en lia cerbo ĉi-nokte. Nekonataj pejzaĝoj, vilaĝanoj survoje, maljuna grizbarba sinjoro kaj lia maldika kamarado, flartabako, rivero, mevoj, pavoj, ŝipo, veturigistoj, monakejo, preĝejo, orgenoj, forĝejo, bona manĝaĵo, papriko en vino...

Fine Korpulentulo sonĝis pli kaj pli bele. Ĝuste li eksonĝis ke tiuj lernantoj, kun kiuj li estis, ekhavis flugilojn kaj flugante en “aero” portas lin, dum li petegas ke ili diru al li siajn alnomojn. Poste ĉirkaŭ li flugis “pavoj kaj numidoj”, poste de ie alflugis frat'-Tetka, sidante surnube kaj frapetante per fingro la orgendojn. Tiu tuta miksaĵaro flugis supren, supren, kaj postflugis tiu malsaneta diakono, tre malgaja pro tio ke li ne

povas atingi ĝin, kaj ĝuste kiam ĝi estis ekironta malantaŭ iun ruĝetan nubon, Korpulentulon ekvekis bruego en la ĉambro kaj la onklo-voĉo:

–Leviĝu, azenaĉo! Ĉu vi en Zvrljevo alkutimiĝis dormi ĝis tiu ĉi tempo, azeno de azenoj!

V LA UNUA OKAZAĴO

Ses semajnojn post la foriro de Korpulentulo estiĝis en Zvrljevo malbona vetero. Nebulo plenigis valojn, poste fortega vento disigis la nebulon kaj igis pluvegon. La soifa grundo rapide sorbis pluvakvon. Poste komencis malrapide sed senĉese pluveti, tiu pluvo kiu penetras paŝtistojn ĝis la ostoj.

Kadukulo, la plej juna Hirtulido, kaŭradis dum tiuj tagoj en iu kabaneto, gardante brutojn. Tra la sekaj branĉoj, per kiuj la kabaneto estis kovrita, penetradis la pluvo, kaj Kadukulo malvarmumis, tiel ke jen kaptis lin febro, jen li tremis pro la malvarmego. Malgraŭ ĉio, la kompatindulo ne ekplendis, sed baraktis kun la malsano kaj ŝancele marŝadis. Sed iuvespere, jam noktiĝis kaj Kadukulo ne venigis la brutaron hejmen. Tiam la patro foriris serĉi lin kaj trovis lin senkonscian. Vespulino tuj divenis kio okazis al li:

–Li surtretis, malfeliĉulo! diris ŝi, kaj ekkuris al Controna de Hokstango, kiu estis spertulino pri tiuj aferoj. Controna alvenis, kvankam ŝi ne bonrilatis kun la vilaĝestro. Trarigardinte Kadukulon, ŝi diris:

–Li sutretis, jes, tio estas certa, sed ĉu la grundelgrataĵon aŭ ensorĉaĵon, oni ne scias! Se sur lia korpo aperos aknoj, tiam li surtretis la grundelgrataĵon, kaj li facile resaniĝos! Sed se estas ensorĉaĵo, tiam... – ekskuis ŝi la kapon.

Vespulino tuj alportis al ŝi freŝan karbardaĵon kaj pelvon da akvo. Controna ĵetis la unuan brulkarberon en la akvon kaj ekdemandis:

–Ĉu pri tio ĉi kulpas Peŝnjetina? – La brulkarbero ekkraketis, sed ne dronis..

–Ĉu Ĉvrlja Oĵegova? – daŭrigis Controna. Ĉu Ĵlandra Ĉukova? Ĉu Vrlja Kukumarova?... Ĉu Ĉandrljaka Kokina?

Je ĉiuj ĉi demandoj la ardaĵoj kraketis, sed neniu dronis.

Fine Vespulino, kiu ĝis tiam svingadis la kapon, ĵetis ardaĵon demandante en si mem:

–Ĉu pri tio ja kulpas tiu ĉi Controna? je tio la ardaĵo: krrrrrr! kaj dronis kiel plumbo.

–Al kiu vi tion destinis, je via fido, Barica? ekdemandis la bofratino rigardante ŝin suspekte.

–Diablo ŝin forigu, kiu ajn estu, sed helpu, Cvita, kaj mi trinkigos al vi bonan vinon! diris Vespulino, kaŝante sian konfuzon per tusado.

Controna trinkigis al Kadukulo trifoje tiun akvon en kiu estis estingitaj karberoj kaj foriris kunportante pro sia klopodo kruĉon da vino. La

bofratino trifoje kraĉis post ŝin, piedpremante la kraĉaĵojn kaj murmurante ion kaj poste ekzorgis la infanon.

La morgaŭan tagon frue, Kadukulo formanĝis du frititajn ovojn kaj fortrinkis glaseton da vino. Lia onklino Controna, vizitinte lin ankoraŭ foje, ekgarantiis per sia animo ke li resaniĝos.

Tiam Kurbulino anstataŭis la malsanulon por la brutaro, Barica kaj Vitriolo teksis, kaj la vilaĝestro ĉarpentadis iujn trabetojn, elirante ĉiumomente antaŭ la pordon por vidi ĉu la vetero ŝanĝiĝis.

Nur dum la postpaŝta tempo ekblovis nordvento kaj aperis surĉiele ioma helaĵo. Tiam la vilaĝestro, Vespulino kaj Vitriolo foriris al la postdoma agro por rikolti maizspikojn. Ili revenis antaŭ noktiĝo, kiam ankaŭ Kurbulino alvenis. Kadukulo dormis, dum Ventregulo ludis en la cindrejo. La dommastrino ŝutis en la poton maizfarunon, kiun la estro kirlis. Apenaŭ post kelkaj glutporcioj Vespulino ekparolis:

–Dio mia, kion faras nun nia Iveto? Ĉu li ankaŭ penmanĝas griaĵon kiel ni?

Ĉu hodiaŭ pluvhumidis mia oro? Ĉu li al kutimiĝis en la monakejo?
La estro mire ekrigardis ŝin.

(daŭrigota)

Historio

Esperanto en la lernejo por blindaj kaj malbonvidaj gelernantoj “Veljko Ramadanović” en Zemun (adreso: Cara Dušana 143)

La lernejo estas fondita ekster la lando dum la unua mondmilito. Nome, vunditaj serbaj soldatoj estis lokitaj en Bizerto (Tunizio, Afriko) en kazerno Lambert por resaniĝo kaj ripozo. En decembro 1917 estis fondita Lernejo por blindaj kaj surdmutaj serboj (Ecole des aveugles et des sourd-muets Serbes). En la lernejon oni lokis blindajn kaj surdajn soldatojn, kiuj perdis vidpovon aŭ aŭdpovon dum la milito.

El „Deklaracio pri la lernejo por blinduloj“ (junio 1918) oni povas vidi, ke la lernejon oni fondis por „eduki blindulojn, ke ili povu reveni al ordinara vivo“. Pro tio en la lernejo ili devus ricevi lernejan edukon kaj lerni iun metion. Krom tio, en la deklaro estas skribite, ke la lernejo translokiĝos al Beogrado, kiam „la cirkonstancoj tion permesos“.

La unua instruisto de blindaj kaj surdaj kaj la estro de la lernejo estis Veljko Ramadanović, la unika homo, kiu konis pedagogian laboron kun blindaj kaj surdaj. En tiuj unuaj tagoj kaj jaroj de fukciado, luktante kun multaj malfacilaĵoj, Ramadanović sukcesis organizi la laboron tiel, ke li ricevis la plej grandajn rekonojn por atingitaj rezultoj. Per sia vitaleco kaj kapablo li sukcesis ankaŭ krei favorajn materialajn kondiĉojn por la laboro de la lernejo. Li sukcesis ricevi konstantajn subtenojn de diversaj aliancitaj misioj. Oni devus nepre mencii „Permanent Blind Relief Fund“ (Konstanta fonduso por helpo al blinduloj).

Ne akceptinte aliajn alfabetojn por blinduloj Ramadanović, kombinante brajlajn literojn, formis serban brajlan alfabeton. Por skribkapabligi blindulojn li bezonis librojn. Pro tio li kreis alfabetlibron por blinduloj „Mia unua ĝojo“. Por povi kompreni, kiajn malfacilaĵojn li havis, oni tion povas ilustru per unu detalo de lia laboro dum presado de „tiu unua serba alfabetlibro por blinduloj“. Ne havante ian ajn presmaŝinon, Ramadanović sukcesis presi la libron per tre primitivaj rimedoj. Li skribis: „Mi prenadis ladon de malplenaj konzervoj kaj petrolujoj, platigadis ĝin kaj faldadis ĝin kvazaŭ paperon. Tiam mi tondadis ĝin al dimensioj de la libro, metadis ĝin en skribtabulon por brajla manskribo kaj per ŝtala pikilo, kies pinton mi rondigis kiel pinglokapon kaj, uzante martelon, tajpis

punktojn individue. Tiel mi tiujn du ladofoliojn povis uzi kiel kliŝon por presado.“

Translokigo de la lernejo en la landon okazis en 1919. La lernejo unue estis en centro de Zemun, en „Ŝpirtina kuĉa“ (Domo de Ŝpirta), kie nun troviĝas muzeo de Zemun. Baldaŭ la lernejo translokiĝis en malplanan aŭstrian kazernon en Zemun. Ĝi troviĝas tie ankaŭ nun.

Longe oni opiniis, ke Esperanto inter blinduloj en Serbio komencis disvastiĝi en 1924. Sed, laŭ indikoj el referaĵo de profesoro Stejskal dum la 3-a internacia kongreso de blindaj esperantistoj 1923 en Nurenbergo, oni povas konstati, ke Esperanton en la lernejo oni lernas ekde 1920. Laŭ la referaĵo, Asocio de blindaj esperantistoj el Ĉeĥoslovakio sendis al la lernejo esperantan lernolibron (de J. Sipiĥova), kiu unu jaron poste aperis en serba versio. Ekzemplero de tiu versio ekzistas en E-societo „Radomir Klajić“ en Beogrado. Bedaŭrinde pli detalaj informoj, krom menciitaj, ne ekzistas.

La unuaj dokumentitaj indikoj pri disvastiĝo de Esperanto en la lernejo devenas el la jaro 1924. Tiam zemuna fotografisto Branko Rajŝić gvidis la unuan kurson por blindaj lernantoj. De tiam en la lernejo oni gvidas esperantajn kursojn ĝis hodiaŭ, unue sporade kaj poste regule. La kursojn unue gvidis Rajŝić kaj poste blinda lernanto Petar Pesić. Branko Rajŝić restis amiko de blindaj personoj ĝis la fino de sia vivo. Unue oni Esperanton lernis libervole kaj poste, iniciatinte de Veljko Ramadanović mem, devige de la 4-a klaso de elementa lernejo.

En aŭtuno 1927 estis fondita la unua societo de blindaj esperantistoj en la lernejo. Ĝi nomiĝis „Nova lumo“. Kiam oni en 1932 reorganizinte Internacian asocin de blindaj esperantistoj kreis internacian asocion de blinduloj, la societo „Nova lumo“ aliĝis al tiu organizo kiel reprezentanto de jugoslaviaj blinduloj.

La lernejo helpis al Esperanto ne nur morale, sed ankaŭ materiale. En la lerneja presejo oni presis (en Esperanto) 26 verkojn brajle kaj 3 nigralitere. La verkojn oni vendadis bagatele aŭ donacadis. Blindajn esperantistojn oni sendadis, koste de la lernejo, al esperantistaj kongresoj, kie ili legadis referaĵojn pri blinduloj kaj senpage disdividadis broŝurojn, kiel ekz. dramon „Ĉe la lulilo“ de V. Tilander dediĉitan al V. Ramadanović.

Jam en 1925 kaj 1926 en la lernejo estis brajle presitaj lernolibro de Maruzzi, esperanta-serbokroata vortaro de Bubalo, kroata-esperanta vortaro de Danica Bedeković, „Kursa lernolibro“ de d-ro Edmond Privat kaj du volumoj de porinfanaj rakontoj „Nia koro“ en traduko de Branko Rajŝić. Ĉiuj tiuj libroj estis senpage liverataj al ĉiuj blinduloj, kiuj sin turnis al la lernejo. La presado de libroj por blinduloj estis precipe intensa post

dungo de Petar Pesić. Oni en 1935 presis eĉ „Fundamentan krestomation“. En 1932 oni nigralitere presis broŝuron de amerika surdmuta blindulino d-rino Helen Keller „Ni vojaĝas al Jugoslavio“ (traduko de Branko Rajšić).

Kompreneble, Esperanto ankaŭ servis al la lernejo por establo de kontaktoj kun aliaj samtipaj institucioj en la mondo kaj konataj tiflogoj kaj blinduloj. Kiel ligo por tio servas B. Rajšić kaj poste J. Buničević kaj P. Pesić (la lastaj du estis dungitaj en la lernejo).

Fine, oni devas aldoni, ke por la tuta disvastigo de Esperanto en la lernejo la plej meritaj estis V. Ramadanović kaj P. Pesić. Ramadanović ne parolis Esperanton, sed bone komprenis ĝian gravecon por blinduloj kaj helpis al ĝi morale kaj materiale. Estime ankaŭ eksterlandaj blindaj esperantistoj nomis lin „patro“. En la gvidantaron de Ligo internacia de blindaj esperantistoj li eniris kiel konsulta membro. En 1937 la ligo, okaze de lia 40-jara defektologa laboro, atribuis al li arĝentan memorplaton.

Fine de la jaro 1949 al direktoro de la lernejo oni proponis eldonadon de brajla esperanta gazeto, kiun oni sendus al interesiĝantoj en la lando kaj mondo, ĉar en la lernejo jam ekzistis longjara tradicio de kunlaboro kun eksterlando per Esperanto. La unua numero de brajla gazeto „Nia vivo“ estis presita en la lernejo en februaro de la jaro 1950. Intertempe la Asocio de blinduloj de Jugoslavio transprenis la presejon kaj daŭrigis eldonadi la gazeton. Sed, pro financaj kaŭzoj la eldonado ĉesis en 1956.

Post la Dua mondmilito en la lernejo Esperanton instruis Vladimir Stefanović ekde februaro 1952 laŭ oficiala aprobo de la ministerio por edukado kaj kulturo. Instruhorojn li gvidis dufoje semajne en ĉiuj pli altaj klasoj (de la 5-a ĝis la 8-a). La notoj estis enskribitaj en la atestilo fine de ĉiu lernojar. Lernantoj, kiuj ne havis noton sufiĉan por trapaso al sekvonta klaso, devis fari korektigan ekzamenon. Bonegajn lernantojn kun bonega konduto la lernejo sendadis al internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj. Kiam, en la jaro 1966 V. Stefanović emeritiĝis, deviga instruado ĉesis. Sed, ekde 1965, en kadro de libervolaj aktivecoj, kursojn de Esperanto komencis gvidi Etelka Kiš-Jakupović.

La lernado de Esperanto en la lernejo ekde tiam estas libervola kaj ĉiujare estas po du grupoj da gelernantoj. Instruadon en tia formo en la lernejo ankaŭ hodiaŭ gvidas Etelka Kiš-Jakupović. La instruado estas gvidata laŭ „Program uvođenja i unapređivanja nastave međunarodnog jezika esperanta u slobodnim aktivnostima učenika u školama SR Srbije“ („Programo de enkonduko kaj avancigo de instruado de la internacia lingvo Esperanto en kadro de libervolaj aktivecoj de lernantoj en lernejoj en SR Serbio“ – „Prosvetni glasnik“, XXXI, numeroj 8, 9 kaj 10).

La lernantoj, krom lernado de la lingvo, korespondas kun esperantistoj el la lando kaj eksterlando, legas esperantajjn librojn kaj gazetojn kaj okupiĝas pri kultur-amuzaj aktivecoj. Renkontiĝoj de la membroj de E-sekcio de la lernejo kun iamaj membroj de tiu sekcio estiĝis jam tradiciaj. Dum tiuj renkontiĝoj oni organizas ankaŭ kultur-amuzajn programojn. Multaj iamaj membroj de la sekcio estas aktivaj partoprenantoj de internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj. La sekcio en sepdekaj jaroj establis kontakton kun asocio „Helen Keller“ el Tokio kaj ricevis donace japanan abakon (sorobanon).

Danke al Esperanto fonduso Evidente el Nederlando konatiĝis kun kazo de multflanke handikapita esperantistino Branka Pešić (Branka Pešić) el la sekcio kaj donacis al ŝi komputilon kun voĉa komunikado. La reprezentanto da le fonduso, aktiva esperantisto ankaŭ li, ankoraŭ hodiaŭ kontaktas kun la sekcio kaj regule sendas materialon, kiun oni uzas por brajla skribado.

La lernejo regule ricevas brajlan gazeton „Esperanta ligilo“, oficialan organon de LIBE, kiu aperas monate.

En la lernejo lernis ankaŭ konata blinda poetino kaj tradukistino Nedeljka Ložajić (Nedeljka Ložajić), kiu estas ankaŭ la prezidantino de LIBE. Pri tradukado okupiĝas ankaŭ Dušan Anđelković (Dušan Anđelković) iama lernanto de la lernejo.

En la jaro 2004 iamaj lernantoj de la lernejo, kiuj Esperanton lernis en ĝi, organizis internacian kongreson de blindaj esperantistoj. Inter iamaj lernantoj, kiuj Esperanton lernis en la lernejo, estas multaj bonegaj esperantistoj, kiuj pasintjare partoprenis internacian kongreson de blindaj esperantistoj en Florenco. En ĉi tiu jaro du lernantoj (Stefan Janjić kaj Jovan Bjelotomić – legu: Stefan Janjić kaj Jovan Bjelotomić), danke al helpo de Ministerio por kulturo kaj Komunumo Zemun, partoprenis internacian kongreson de blindaj esperantistoj en Albeno (Bulgario) kun aliaj ses iamaj gelernantoj de la lernejo.

Esperantistoj, iamaj lernantoj de la lernejo (Ranko Bulić, Goran Jončić, Ljiljana Nikolić, Slavica Malešević, Emilija Matić, Maja Jončić, Faredin Dauti, Darko Milošević kaj aliaj – legu: Ranko Bulić, Goran Jončić, Ljiljana Nikolić, Slavica Malešević, Emilija Matić, Maja Jončić, Faredin Daŭti, Darko Milošević), estas aktivaj en tradiciaj aranĝoj kaj diversaj manifestacioj en Ligo de blinduloj en Beogrado, en Etnografia muzeo kaj en E-societoj en Beogrado, Niŝ, Jagodina kaj aliaj. Venontan jaron en Niŝ okazos kongreso de serbaj esperantistoj kaj en la organiza komitato estas ankaŭ iama lernanto de la lernejo Nenad Radenković (Nenad Radenković). La lernantoj de la lernejo ĉiujare partoprenas lerneajn aranĝojn recitante en Esperanto.

En la lerneja biblioteko ekzistas muzeo, kiu kronologie montras laboron kun blinduloj ekde la fondo de la lernejo. En la muzeo ekzistas montrofenestro por esperantistaj aktivecoj.

Etelka Kiš-Jakupović laboris en la lernejo kiel sociala laboristo de 1965 ĝis 1988. Tiam laboro en E-sekcio de la lernejo estis parto de ŝiaj labordevoj. Kiam ŝi en 1988 emeritiĝis, ŝi daŭrigis instrui Esperanton libervole kaj tion ŝi faras ankaŭ nun.

En la jaro 2004, kiam ŝia frato estis grave malsana, sinjorino Tereza Kapista anstataŭis ŝin kaj instruis Esperanton dum 16 instruhoroj. Du jarojn en la instruado, pro pli granda nombro de interesitaj lernantoj, partoprenis ankaŭ Nedeljka Ložajčić.

Etelka Kiš Jakupović




De maldekstre: Petar Pesić, Etelka Kiš-Jakupović, Vladimir Srefanović, Branko Rajšić

Jubileoj

Petar Petrović

UROŠ PREDIĆ (1857-1953)

- Okaze de la 150-a naskiĝdatreveno -



Mia biografio povus esti skribita en kelkaj linioj, ĉar miaj tagoj pasis je fluo de la vivo de simplaj homoj..." estas la unuaj vortoj, per kiuj Uroš Predić komencis sian biografion la jaron 1921. Estas vero ke nia granda artisto ne gvidis tiel dinamikan kaj emocian vivon, kiel ekzemple lia samtempulo Paja Jovanović, el urbo Vršac. Aliflanke, estas vero ke Predić sian longan vivon dediĉis al konsciencia agado, pro kio li, ĉe la fino de aŭtobiografio, diras – *la ĉefa karakterizo de miaj agoj estas la konscienco.*

La konscienco ne estis unika lia konata kvalito. Li ankaŭ estis altmorala, ĉar li devenis el la estimata pastra familio el vilaĝo Orlovato en Banato. Predić estis altsaĝa, ĉar li sufiĉe frue ekinteresiĝis pri libroj, aparte pri l'arto. Li estis tre alligita al patro kaj la patrino, al siaj parencoj, kvankam li mem ne fondis propran familion. Fine, li estis konscia de sia rolo dirante je la fino de la vivo: „Mi laboris multe kaj ĉiam konscie havante la kontentigon ĉar mi plenumis mian devon".

Morala, konscia kaj ĉiam sintena en la komentarioj, Uroš Predić evitadis taksu aŭ kritiki la agon de l' artistoj samtempuloj. Dum la jaroj inter la du mondmilitoj, en epoko de la kreado kaj de la plena konfirmo de moderna pentraĵo, Predić restis fidela al plialtigaj reguloj de la klasika arto kaj realisma pentrado, kies bazaj postuloj estis la mezuro, klareco kaj harmonio. En sia laboro li ĉiam donadis la maksimumon, sendepende kion kaj por kiu li pentris; se iu pentraĵo estis pli bone finlaborita, li unue dankis al la temo mem, kaj poste al sia propra kaj granda pentrista lerteco. Nia pentristo sola akurate gvidis la evidentecon pri siaj agoj, por kiu kaj kiam li laboris ion kio eĉ hodiaŭ tre plifaciligas la laboron al fakuloj kaj esploristoj trovi unuopajn informojn.

La homeco de Uroš Predić estis plenumita per nobleco kaj varmeco, per la mieno de milda vizaĝo de granda filantropo. Lia vizaĝo rememoras al la vizaĝo de iu sanktulo en niaj mezepokaj freskoj – asketa vizaĝo kun griza hararo kaj barbeto. Liaj okuloj povis fiksrigardi ĉiun detalon, kiu en la pentraĵo havis decidigan signifon. Krom tio, lia spirito al ĉio aldonadis fantazion, sentemon kaj meditemon sen kiuj liaj pentraĵoj estus malperfektaj kaj malvarmaj.

Uroš Predić naskiĝis en banata vilaĝo Orlovato la 7-an de decembro 1857. Je la 19-a jaro de la vivo li venis en aŭstrohunganan ĉefurbon kaj komencis studi ĉe la Akademio de pentroarto. Baldaŭ Predić ricevis la unuan premion de l' Akademio por la plej bone farita studo de kapo (*Malbonhumora knabineto*, 1879) kaj, kiel la plej bona en la klaso, li estis elektita la asistanto de la profesoro Kristiano Gripenkerl. Dum sia restado en Vieno, la okan jardekon de la XIX jarcento, Predić faris plurajn komponaĵojn el la greka mitologio dediĉitajn al la nova konstruaĵo de la viena parlamento. Dezirante viziti Italujon por la studado, li faris la skizon por la ikonaro de la preĝejo en urbo Smederevo, sed la monon por tio la urba komunumo elspezis por la flego de vunditoj en la serboturka batalo. Pro tio Predić devis prokrasti sian viziton al Italujo.

En la plej bonaj jaroj de sia vivo, Predić decidis anstataŭigi sian karieron de sukcesa pentristo kaj de asistanto ĉe la profesoro Gripenkerl per sia malgranda Orlovato, por esti la konsolo al siaj patrino kaj patro en iliaj lastaj jaroj. Li mem atestas ke tiuj dekkvin jaroj en Orlovato estis por li la plej feliĉaj – tiam li fariĝis la ikonpentristo de kristanaj temoj kaj la pentristo de portretoj.

Ikonaroj en Malnova Beĉej, Perlezo, Rumo, en la episkopa kortego de Sremski Karlovci, monakejo Grgeteg, Panĉevo, ikonaro en la naskiĝloko Orlovato, en Melenci kaj Libertvilo (Usono) – estas neĉiutagaj agoj de nia tiama preĝeja pentroarto, kiam la estetiko de okcidenteŭropa moderna penetris en ĉiujn nivelojn de l' arto kaj kulturo.

Granda galerio de portretoj, kiujn li dum jardekoj konscie kaj sindone vicigis parolas pri homoj konataj kaj gloraj same kiel pri simplaj, modestaj kaj ne tiel konataj personoj de tiama epoko, kiuj amis kaj estimis l' agon de nia granda pentristo.

En la jaro kiam oni festas 150 jarojn de lia naskiĝo, ni rememoras liajn vivon kaj verkojn, admirante kaj spektante liajn pentraĵojn, kaj

aŭskultante liajn pensojn kiel grajnetojn de la saĝeco, sen kiuj en la estonteco oni povas nenion taŭgan fari. El tiuj saĝaj grajnetoj ni apartigas jenon: „La artisto devas per granda pacienco kaj multflanka atento studadi ĉirkauaĵon en la vivo kaj en ĝi li devas kontribui per sia peno.“

Tradukis: Dr-o Miodrag Stojanović



Du konataj verkoj de Uroš Predić – „Fuĝintoj el Hercegovino“ kaj „Orfo“

PAŜO AL EŬROPO DE SERBA KLERIGISTO DOSITEJ OBRADOVIĆ

Okaze de 200-jaroj de lia fariĝo la unua serba ministro de klerigo (1807-2007)



En la serba historio la 18-a jarcento estas epoko de nacia kaj kultura renesancoj. La klerigo de serboj havis la rolon analogan al la renesanco de pluraj aliaj eŭropaj literaturoj. Tamen, la serba kleriga movado reflektiĝas en la verko de Dositej Obradović (1739/??-1811), kiu konceptis kaj helpis realigi la tutan epokon al kiu li apartenis.

Pri la unuaj siaj vojaĝoj en la vivo Dositej skribis en la memoraĵoj: „Ĉakovo nomiĝas la vilaĝo en kiu mi naskiĝis, Timiŝoaro, fama urbo en kiu mi lernis, la monakejo Hopovo en kiu mi monakiĝis“. En monakeja biblioteko li trovis kaj legis librojn kies enhavo etendiĝis ekster la teologiaj kadroj kaj ili estis plensorbitaj per racionalismaj kaj klerigaj elementoj.

Forlasinte la monakejon Dositej vojaĝis en plurajn eŭropajn urbojn kaj kulturajn centrojn, dezirante lerni fremdajn lingvojn kaj studi historion kaj kulturon de pluraj antikvaj kaj modernaj popoloj. En oktobro 1765 Dositej atingis la mediteranean tiaman grekan urbon Smirnon, ĉe rivero de Malgradazio, kie li aŭskultis prelegojn de novgreka Sokrato – Jeroteo Dendrino. En lia tiama lernejo estonta serba klerigisto la unuan fojon venis en la kontakton kun klerigaj ideoj de la 18-a jarcento.

Post la studado en Smirno, Korfu (Korciro) kaj aliaj grekaj urboj serba klerigisto venis en Vienon kie li pasigis, kiel li mem diras, „ses utilajn kaj ĝojajn jarojn“ (1771-1776), konstante prelegante al aliaj aŭ lernante siajn lecionojn.

Dum la lernoĵaro 1782-1783 Dositej studis ĉe la universitato en urbo Hale kaj aŭskultadis prelegojn el filozofio, estetiko kaj „naturteologio“. En tiu urbo li renkontis, por tiama periodo, sufiĉe evoluigitan eldonadon de libroj. Tio instigis lian grandan kaj malnovan deziron skribi kaj eldonadi racionalismajn kaj klerigistajn librojn en serba popola lingvo. Eĉ pli granda eŭropa libro-eldona centro tiam estis Lepsiko (Lejpcigo), kie Dositej presigis multajn siajn librojn en cirilaj literoj.

Vojaĝante al Londono, konata serba klerigisto restis tri semajnojn en Parizo, senĉese pensante pri la skribado kaj eldonado de serbaj libroj. „Adiaŭ restu,“ diris li, „ne nur Londono kaj Parizo, sed ĉiu loko en la mondo, kie mi ne povus plenumi tiun mian plej grandan deziron“. Pro tio

li denove revenis en Lepsikon kaj Vienon, kiuj havis grandan signifon por la literatura verko de serba verkisto.

Intertempe, Dositej Obradović verkis siajn ĉefajn verkojn: *La vivo kaj la travivaĵoj* (aŭtobiografio), Lepsiko 1783; *Fabtoj* (Lepsiko 1788), kune kun la dua parto de la aŭtobiografio; *Kolekto de pluraj didaktikaj artikoloj* (*Sobranije*, Vieno 1793), *Etiko* (Venecio 1803), *Dorlotato* (Budapeŝto 1818, postmorta eldono), la dua parto de *Kolekto*.

En la jaro 1802 Dositej forlasis Vienon kaj foriris en Trieston, kie li trovis multajn mecenatojn inter la serbaj komercistoj. En tiu itala urbo li faris projektojn por fondi en Serbio lernejojn kaj ordigi presejojn. Pri tio li skribis en unu letero: „Dank' al Dio por la plibonigo de la stato en Serbio“ (laŭ gazetaj informoj). Pri tio Eŭropo povis legi en vienaj, londonaj kaj parizaj revuoj kaj gazetoj.

La venkoj de serbaj ribeluloj (1804-1807), sub la gvidado de Đorđe Petrović – pli konata je la nomo Karađorđe, firmis ilian fidon je landa libereco de turkokratio. Kiam liberiĝis la ĉefa urbo Beogrado, Dositej skribis: „En tiu ĉi momento mi ĝojas ĉar en ĝi ne regas turkoj. Venos tago kiam ĝi fariĝos la gloro de urboj, ĉar ĝi estas loko de nepriskribebbla beleco“. Samtempe oni starigis la plej gravan demandon antaŭ la gvidantojn de popola ribelo – kiamaniere serboj povus ordigi la propran domon. La plej favora homo por tio estis vere erudicia kaj sperta Dositej Obradović.

Veninte en Serbion (1807), Dositej proponis kunigi edukitajn homojn, kiuj povus helpi en diversaj branĉoj de la ŝtata kaj socia vivoj.

Dum lernojaro 1808/09 Dositej Obradović malfermis (inaŭguris) en Beogrado Altan lernejon kaj teologian seminarion, estiĝante samtempe la unua serba klerigministro. La dekreto de Karađorđe pri tio tekstas: „Sinjoro Dositej Obradović fariĝas ministro de popola klerigo; li vere scios la regulojn por la klerigo, kaj se estas bezonataj popolaj instruistoj – serĉu ĉe li!“

Dositej vere sian influon uzis nur por la prospero de Serbio. Li uzis propran vojon, la vojon de sia filozofio de vivo je la utilo de sia patrujo kaj de ĉiuj bonaj homoj en la mondo.

* * *

Per la modela sento de nacia solidareco, Dositej skribis *La poemon pri la insurekcio de serboj*, pli konatan sub la titolo *Leviĝu Serbujo*, dediĉitan al Serbio, al ĝiaj kuraĝaj herooj kaj al duko Karađorđe. Ĉi tie ni aldonas tri strofojn de la plej konata poemo-himno ***Leviĝu Serbujo*** - traduko de s-ano Zlatoje Martinov.

Dositej Obradović
(1739/?! - 1811)

LEVIĜU SERBUJO

Leviĝu Serbujo! Leviĝu l' aminda!
Bela estas vizaĝo via milda.
Ĝojigu korojn kaj okulojn niajn
Permesu aŭdi belajn voĉojn viajn.

Leviĝu Serbujo,
Tro longe vi dormis,
En mallumo kuŝis,
Nun vi leviĝu!
La serboj vekiĝu!

Alten levu vian reĝan kapon
Por ekkoni vin tero kaj maro,
Montru al l' mondo vian veran belon
Ho, kreu por ni la ĉielan helon!

Leviĝu Serbujo,
Tro longe vi dormis,
En mallumo kuŝis,
Nun vi leviĝu!
La serboj vekiĝu!

Al vi helpas la Dia inklino
Pli bela estos via destino.
Ni, idoj, scias – al bono vi vojas,
Popoloj fremdaj pro vi vere ĝojas!

Leviĝu Serbujo,
Tro longe vi dormis,
En mallumo kuŝis,
Nun vi leviĝu!
La serboj vekiĝu!

Доситеј Обрадовић
(1739/?! - 1811)

ВОСТАНИ СЕРБИЈЕ

Востани Србије! Востани царице!
И дај чадом твојим видет твоје лице.
Обрати срдца их и очеса на се,
И дај њима чути слатке твоје гласе.
 Востани Србије!
 Давно си заспала,
 У мраку лежала.
 Сада се пробуди
 И Србље возбуди!

Ти воздвигни твоју царску главу горе,
Да те опет позна и земља и море.
Покажи Европи твоје красно лице,
Светло и весело, како вид Данице.
 Востани Србије!
 Давно си заспала,
 У мраку лежала.
 Сада се пробуди
 И Србље возбуди!

Теби сад помаже и небесна воља
И сад ти се показује судбина боља.
Сви ближњи твоји теби добра желе
И даљни се народи твом добру веселе.
 Востани Србије!
 Давно си заспала,
 У мраку лежала.
 Сада се пробуди
 И Србље возбуди!

(1804)

Nuntempuloj

DU KUBETOJ DA SUKERO



En la pasinta numero de nia revuo vi povis legi tri esperantigitajn poemojn de nia konata artistino Eva Ras. Ne miru, ke ni denove pritraktas ŝian verkaron, ĉar okazis gravaĵo koncerne ŝin. Nome, antaŭ nelonge ŝi gajnis la unuan premion kadre de anonima internacia literatura konkurso organizita en Kroatio. Jen fragmentoj el la premiita novelo portanta la titolon „Teruraj tagoj en Dohaŭ“ (sub ĉifro: „Du kubetoj da sukero“):

„Mi havis feliĉon postvivi la enkarcerigon en Dohaŭ, sed milionoj da aliaj ne havis tiun feliĉon. Post ĉio mi povas nur

bedaŭri miajn torturintojn, ĉar esti homo, kiu murdas senkulpajn personojn, tio ja estas granda sortopuno, filino mia. Pli kontentas mi estinte viktimo ol se Dio estus permesinta al mi fariĝi ekzekutisto.“

Davido ekamikiĝis en Dohaŭ eĉ kun germanoj. Mi ne scias, kiel li sukcesis malkovri al ili sian metiarton, sed veras, ke li entuziasmigis ilin per baklavoj, tulumboj, halvoj, limonadoj kaj grenlimonadoj¹, tiamaniere ke laŭ bezono oni forkondukis lin el la koncentrejo. Li parolis germane ... estis talenta por lingvoj ...

En Dohaŭ troviĝis ankaŭ Stevo Ŝigon (prononcu: Stevo Ĵigon), kaj rememoriginte lin, li demandis ĉu ni konas lin aŭdinte, ke Stevo eklokiĝis en Beogrado kaj fariĝis aktoro. Li memoris, ke Stevo havis violonon ... Ankaŭ Stevo memoris Davidon dirante, ke ili amikiĝis kaj, ke dum SS-baloj, Davido ĉiam kontrabandis por li po du kubetojn da sukero kaŝitajn en sia kalsono.

Davido estis juna kaj afabla, ne povis malami, li entuziasmigis la germanojn kaj per la dolĉaĵoj, kiujn li preparadis por iliaj diboĉoj, kaj per

¹ Orientaj dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj

sia ridetemo. „Mi tie ne renkontis gravulojn, tiuj kiujn mi vidadis, plenumis nur la komadojn kiel ĉiuj soldatoj en la mondo, kaj kiam ili festis ion, kial mi ne estus helpinta al ili se mi povis fari tion, ankaŭ ili ja estis homoj“ ... Fine de la jaro 1944 oni kaŝe prizorgis al li uniformon kaj helpis al li eskapi. Tiel vestitan en germana uniformo kaptis lin soldatoj de la fama Ruĝa Armeo kaj forkondukis lin al Siberio, kie li restis enkarcerigita ĝis la jaro 1953. Oni liberigis lin nur post la morto de Stalin...

Avino Sarina estis eksterordinara persono – laŭ la priskribo de la aŭtorino. Tre energia, ŝi ĉiam sekvis siajn proprajn konceptojn kaj volon. Tion bonege ilustras jena fragmento:

La unuan fojon post la Dua mondmilito ŝi renkontis mian patron la 23-an de oktobro 1956, ĝuste kiam ekrompiĝis la revolucio en Hungarujo, kaj mia patro, plena je revolto kontraŭ la sovietoj, pro sia kaptiteco en Siberio, aliĝis al la ribeluloj ... Avino akompanis sian filon kaj partoprenis kun li en la faligo de la Stalina statuo. Ŝi kunprenis peceton de la monumento, al kies renversado ŝi kontribuis dum pluraj tagoj.

Avino Sarina mortis je sia centunua vivjaro. Iĝinte sepdekjara ŝi forvendis tutan sian havaĵon: kampojn, bovinojn vinberĝardenojn kaj disdonis la monon al siaj filoj. Vivinte ankoraŭ tridek jarojn, ŝi senĉese vojaĝadis de Upsala ĝis Orlovat, restinte po kelkajn monatojn jare ĉe ĉiu filo ... La morto trafis ŝin en ekspresvagonaro Polonia proksime al Budapeŝto, kie oni enterigis ŝin.

Agnesa Eremija

Recenzoj

Neordinara beograda esperanta gazeto

TRI NUMEROJ DE “PRIMARA”

En serba esperantistaro ekzistas unu neordinara, ĉefe elektronika, gazeto. Ĝi nomiĝas “Primara” kaj ĝia ĉefredaktoro kaj eldonisto estas membro de beograda Esperanto-societo “Radomir Klajiĉ”, d-ro Pribislav Marinkoviĉ, konata inter esperantistoj kiel Priba. Priba estas homo kun diversflankaj intereso, inter alie, profesoro kiu gvidis multajn kursojn por esperantistoj, verkisto de deko da libroj kaj aparta fakulo pri historio kaj lingvo de arumana popolo.

La celo de la gazeto – diras Priba – estas interkomunikiĝi kun legantoj, ĉefe miaj amikoj aŭ konatuloj. – Li deziras konatigi ilin pri okazaĵoj el lia vivo, pri diversaj aktualaj okazaĵoj el lia persona vidpunkto. Pli grava tasko de gazeto estas utiligi Esperanton kaj praktiki ĝin tiel, ke oni povu paroli ĝin flue kiel la nacian lingvon. Ĉio, kompreneble, estas senprofita, sed porinstrua kaj poreduka.

Priba pravas. Ĝisnuna lia “Primara” havas tridek legantojn. Estos pliaj – esperas Priba. Legantoj povas tralegi pri multaj iamaj kaj aktualaj okazaĵoj el lia iama kaj nuntempa vivo. En daŭrigoj aperas teksto de autobiografio de Aranĝel Iliĉ, tre interesa viva rakonto el Serbio. Utiligante Esperanton kiel lingvoponton inter la estona kaj serba, Priba aperigas en daŭrigoj, lirikan romanon “La mastro de Korboje” de A. H. Tamasare. En la unua numero estas interesa teksto pri ĉina ekonomia sindromo (Priba estas d-ro de ekonomiaj sciencoj), tradukoj de klasika serba poezio, aparte de poemoj de la konata serba poeto Vojislav Iliĉ Mladji, onklo de Priba, teksto pri despoto Stevan Lazareviĉ k.a. La dua numero enhavas novajn rubrikojn, aperas interesa teksto pri komenco de la Dua mondmilito, recenzoj pri teksto de Zlatoje Martinov en “Respubliko” kaj recenzoj de la libro “La centa simio” (tradukita per Esperanto en la serban) kaj recenzo pri libro “Esperanto – lingvo de paco en Burundi Afriko” de Tereza Kapista. En ĉiu numero aperas traduko de la lernolibro “Esperanto” de J. Kresvel kaj J. Hartli. En la tria numero atenton meritas riĉilustrita teksto pri sukcesoj de niaj getenisistoj.

“Primara” estas kiel neordinara, tiel interesa kaj amuza por legado. Mi deziras al Priba plenan sukceson en lia interesa laboro.

D. Janiĉiĉ

Informoj



AFIŜO PRI ESPERANTO

Okaze de la 120-"naskiĝtago" de Esperanto niŝa Fervojista Esperanto-societo "Mile Veličkoviĉ" organizis komencon de "Somera E-Lernejo" la 26an de julio.

La enkonduko al la E-lernejo okazis dimanĉon, la 22an de julio, kiam estis organizita interŝanĝo (por la urbaj esperantistoj) kaj ekspozicio (por la urbaj neesperantistoj) de diversaj esperantaĵoj (libroj, libretoj, revuoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, flugfolioj, informiloj, vortaroj, diversaj lernolibroj...).

La "E-lernejo" (fakte temas pri la A-kurso) daŭros tri monatojn. Nuntempe ĝin partoprenas deko da interesuloj.

Krom la kurso oni organizis ankaŭ la starigon de afiŝo (vidu foton) pri Esperanto en la centra urba strato-promenejo. Tiu loko estas signifa ĉar ĝin ĉutage trapasas preskaŭ ĉiuj loĝantoj de la urbo kaj ĉiuj gastoj/turistoj.

La afiŝo troviĝas ĝuste en la urbo-centro. La urba komunumo donis al la societo rajton senpage starigi superstratan afiŝon dum dek tagoj (kutime oni sufiĉe pagas tiun ĉi eblecon). Aldona valoro de ĝuste nuntempa starado de la afiŝo estas ke samtempe en Niŝ okazas ankaŭ plej signifa, plej tradicia kaj tre populara Niŝa film-festivalo (la 42an fojon, ĉi jare).

Zoran Ĉirić

Internacia kongreso en Albena

De la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 2007 en Albena (Bulgario) okazis la 73-a Internacia Kongreso de blindaj Esperantistoj, jam la kvara kiun organizas blindaj Esperantistoj el Bulgario. En la Kongreso partoprenis 128 blindaj geesperantistoj kaj iliaj akompanantoj el dekdu landoj.

Ĝi komenciĝis kun jam tradicia Interkona vespero kaj la oficiala malfermo okazis matene la 21-an. La malfermon ĉeestis prezidento de la Bulgara Asocio de blinduloj kaj reprezentanto de la Bulgara E-Asocio. Estis akceptita propono ke la prezidento de la Kongreso estu, prezidento de ANEB (Asocio de nevidantaj Esperantistoj de Bulgario), Vladimir Ĵelev, vicprezidantoj Anatolij Masenko kaj Otto Prytz kaj sekretarioj, Natalija Kasimova kaj Dimo Dimov.

Sekvis preskonferenco, gvidita de Veselina Stoilova, en kiu pri la movado inter la blinduloj parolis Vladimir Ĵelev kaj Nedeljka Loĵajiĉ.

Enkondukan referaĵon pri la ĉeftemo de la Kongreso "Esperanto - taŭga vojo por kultura integriĝo", emfazante ĝian rolon por integriĝo de la blinduloj, preparis Danĉo Danĉev, longjara Esperantisto kaj ĉefredaktoro de Brajla E-gazeto, "Esperanta fajrero". Inter pluraj interesaj prelegoj kiujn ni havis okazon aŭskulti, mi menciuj kelkajn: "Bulgara Nacia biblioteko kaj Esperanto" de Spas Karafezov, "Esperanto kiel ponto inter diversaj naciaj literaturoj" preparita de Antun Kovaĉ kaj Nedeljka Loĵajiĉ, "Kion blindaj Esperantistoj povas trovi en la reto?" prezentita de Mariana Evlogjeva.

Okazis du kunsidoj de Ĝeneralasembleo de LIBE (Ligo Internacia de blindaj Esperantistoj), dum kiuj oni raportis pri la pasintjara laboro de la Ligo kaj de la landaj organizoj, estis diskutite pri la enhavo de la organo de LIBE, "Esperanta ligilo", kunlaboro inter LIBE kaj EBU (Eŭropa Blindul-Unio) kaj aliĝo al EBU, sekvantjara IKBE ktp.

Kulturarta programo plenumis niajn vesperojn kaj estis interesa kaj altnivela. Du naciaj vesperoj kaj unu internacia, vekis grandan interesiĝon. Tamen, la Internacia vespero, ĉi-jare estis malpli internacia ol kutime estas. Du duontagaj ekskursoj, unu al proksima Balĉik kun vizito al Nova palaco, Botanika ĝardeno kaj potfarejo kaj la dua al Varna kie oni vizitis Katedralan templon, dediĉitan al Sankta Dipatrino, Fanagoria kaj Parko-muzeon Vladislav Varenĉik.

NOSOBĒ (Nederlanda Organizo de blindaj Esperantistoj), ne povos organizi sekvantjaran IKBE-n. Plej verŝajne, oni akceptos oferton de Kroata Unuiĝo de nevidantaj Esperantistoj organizi ĝin en apudmara loko, Premantura.

En la Kongreso en Albena partoprenis ok blindaj geesperantistoj kun sep geakompanantoj el Serbio. Ĉiuj, krom du lernantoj, por kiuj ĉion pagis Respublika ministerio pri kulturo, Blindul-Asocio de Beograd kaj

Komunumo Zemun, propramone pagis sian partoprenon. Mi kredas, ke ĉiuj estis kontentaj pri sia restado en Albena kaj ke ili sentis kaj komprenis praktikan rolon de Esperanto en la kultura kaj sociala integriĝo.

Nedeljka Ložajić

Renkontiĝo de esperantistoj en Leskovac

En urbo Leskovac, fare de la urba Esperanto-societo, en la kadro de urba tradicia manifestacio "Rostilfesto" ("Roštlijijada"), sabaton la 8an de septembro estis organizita renkontiĝo de serbiaj esperantistoj. La renkontiĝon partoprenis reprezentantoj de esperanto-societoj el Beograd, Niš, Leskovac, Jagodina, Zaječar, Novi Sad kaj Senta. Okazis ankaŭ kunveno de la prezidantaro de Serbia Esperanto-ligo kaj organiza komitato de La unua kongreso de serbiaj esperantistoj kiu okazos en majo venontjare.

En agrabla etoso partoprenantojn de la renkontiĝo salutis vicprezidanto de la komunumo Leskovac, s-ro Branko Ĝorĝević kaj prezidantino de E-societo Jelena Tončić.

La prezidantaro akceptis la raporton pri Jokohama UEA-kongreso de A-komitato SEL s-anino Tereza Kapista, akceptis provizoran programon de La unua kongreso de serbiaj esperantistoj (ĝi okazos en Niš, en majo 2008). En la programo de venonta E-kongreso aparte estas interesa faka parto de la kongreso, ĉar membroj de E-Instituto preparos ok fakajn sciigojn pri diversaj temoj.

Dimitrije Janičić

Ĝemeligitaj urboj

KUNLABORO DE BEOGRADAJ KAJ ĈIKAGAJ ESPERANTISTOJ

Beograda Esperanto societo "Radomir Klajić" kaj Esperanto-societo de Ĉikago (Chicago – urbo en ŝtato Ilinojso, USA) en ĉi tiuj tagoj establadis unuajn ligojn. Ideo devenis de la prezidanto de Ĉikaga Esperanto-societo, s-ro Viktor Pajuk.

Urbo Ĉikago (Usono) kaj urbo Beograd (Serbio) ĝemeliĝis la 7an de junio 2006. Ĉarton pri ĝemeliĝo subskribis tiamaj urbestroj de Beogrado kaj Ĉikago, Riĉard Dejli kaj Nenad Bogdanoviĉ. Beogrado per subskribo de la ĉarto fariĝis la 25a urbo (apud Milano, Parizo, Ateno, Ŝangajo, Moskvo k.a.) kiu ĝemeliĝis kun tiu trimiliona urbo.

Esperantistoj de du urboj planas interŝanĝi informojn pri aktivecoj por siaj bultenoj, organizi interkonojn kaj personajn kontaktoj en

kongresoj, interŝanĝi librojn kaj esperantaĵojn kaj partopreni en interurba kunlaboro.

La unuaj paŝoj estas faritaj. Ni esperas ke la kunlaboro en estonteco helpos al ambaŭ societoj plibonigi la lernadon de la internacia lingvo kaj amikajn kontaktojn de esperantistoj el tiuj geografie malproksimaj sed anime proksimaj urboj.

Informis: Dimitrije Janičić

El Senta

RAPORTO PRI ESPERANTO AGADO DUM SOMERO

De la 10-a ĝis la 20-a de junio en somerumejo de la Serbia Ruĝa kruco Magdolna Revid gvidis esperantan komencan kurson por 49 geinfanoj de 8 ĝis 15 jaroj. Ili estis el 5 komunumoj de Vojvodino, kaj povas daŭrigi la kurson en Senta, aŭ pere de interreto.

En julio kaj aŭgusto estis somera kampadejo de Gimnazio por talentuloj el matematiko „Bojai“. Magdolna Revid havis du foje du horojn por promocio de Esperanto. En unu grupo estis pli ol 40 geinfanoj 14-15 jaraĝaj. La duan fojon ankaŭ ĉeestis 40 geknaboj. Tiun fojon en prezentado de Esperanto-lingvo partoprenis ankaŭ samideano Laslo Husar el Kanjiĝa. Post tiu promocio ĉiu el geknaboj scipovas paroli pli ol dek frazojn en Esperanto. Ili ankaŭ ricevis propagand-materialon de Esperanto societo "Tibor Sekelj" el Subotica kun interretaj adresoj por daŭrigi la lernadon.

La 8-an de septembro okazis en urba centro Ago-tago de civilaj organizaĵoj. En propaganda agado nome de Esperanto societo el Senta agadis prezidanto Siniŝa Veliĉkoviĉ, Erĵebet Kermeci, Ilona Kiŝ, Imre Belec kaj Vilmoŝ Arnold, membroj de Esperanto-klubo Senta. Post tiu propagando, kurso por komencantoj ekkomencos la 18-an de septembro. Esperanto-societo en Senta okaze de manifestacio "Verdaj amikaj tagoj" aperigis poemaron sub titolo "Bela Tibisko kaj bunta Vojvodino" kun tradukitaj poemoj de nuntempaj poetoj el Vojvodino. La tradukojn faris Boriŝa Miliĉeviĉ, Ludoviko Sekereŝ, Judit Barta, Vilmoŝ Arnold, Ilona Kiŝ, Erĵebet Kermeci, Etelka Naĝ Zambo kaj Magdolna Revid. La tekstojn lektoris Boriŝa Miliĉeviĉ kaj Ludoviko Sekereŝ. Ni havas ankoraŭ pli da materialo, sed ne havas monon por eldonado de la libro.

Esperanto-kurso

ИСПРАВКА:

У другом наставку грешком је дошло до изостављања једног дела курса. Извињавамо се читаоцима. Изостављени део је следећи:

После *Пословица – Proverbo*: Tempo estas mono треба да дође:

Сви придеви у есперанту завршавају се на -а. Један те исти наставак у есперанту важи за сва три рода придева у српскохрватском језику.

bona	-добар, а, о	bela	-леп, а, о
sana	-здрав, а, о	pura	-чист, а, о
alta	-висок, а, о	larĝa	-широк, а, о
longa	-дуг(ачак),а, о	granda	-велик, а, о

bona kamarado	-добар друг
bela ŝalo	-леп шал
sana persono	-здрава особа
pura domo	-чиста кућа
alta monto	-високо брдо
larĝa strato	-широка улица
longa rivero	-дуг(ачк)а река
granda urbo	-велики град

Истим наставком -а градимо присвојне заменице (у есперанту су присвојни придеви).

mi	-ја	mia	-мој, а, е
ci, vi	-ти	cia, via	-твој, а, е
li	-он	lia	-његов, а, о
ŝi	-она	ŝia	-њен, а, о
ni	-ми	nia	-наш, а, е
vi	-ви	via	-ваш, а, е
ili	-они	ilia	-њихов, а, о

mia bela domo	-моја лепа кућа
via bona kamarado	-твој (или ваш) добар друг
lia pura ŝalo	-његов чисти шал
ŝia alta vazo	-њена висока ваза
nia larĝa rivero	-наша широка река
via longa fiakro	-ваш дуг(ачк)и фијакер
ilia granda biblioteko	-њихова велика библиотека

После овога следи већ објављени текст: Ако желимо да изразимо ...

(наставак)

Прошло време у есперанту је просто време за разлику од нашег, и то треба стално имати у виду. Гради се додавањем наставка -iS на корен речи за сва лица једнине и множине:

mi estis	ја сам био, била или био сам
ŝi sidis	она је седела или седела је
ili sidis	они су седели или седели су
	оне су седеле или седеле су
	она су седела или седела су

∴

Ekzerco

kiu	-ко, који, а, е	tiu	-тај, онај, а, о
tiu ĉi			
или ĉi tiu	-овај, а, о	de	-од или други падеж без предлога
el	-iz, od	urbo	-град, варош
semajno	-недеља (7 дана)	kun	-са

-Kiu estas li? или Kiu li estas?
-Li estas patro de mia kamarado.
-Kaj tiu persono?
-Ŝi estas mia fratino.
-Tiu ĉi (или Ĉi tiu) lernantino sidas kaj lernas el la libro de Esperanto.
-Du personoj, kiuj staras en la ejo, estas esperantistoj.
-La unua estas poŝtistino kaj la alia estas profesorino.
-Ĉu vi estis hieraŭ en la urbo? -Jes, mi estis kun mia patrino.
-Tiu ĉi (или Ĉi tiu) tago estas ĵaŭdo.
-Ĝi estas la kvara tago de la semajno.

Tagoj de la semajno: lundo – понедељак; mardo – уторак; merkredo – среда; ĵaŭdo – четвртак; vendredo – петак; sabato – субота; dimanĉo – недеља.

Proverboj

Kiu demandas, tiu ne eraras. – (Ко пита, тај не греша) Ко пита, не скита.
Razisto raziston razas. – Брица брицу брије.

∴

Четврти падеж (акузатив)

У есперанту постоји само један падежни наставак у једнини и множини. То је наставак **-n** за четврти падеж или акузатив. Већ смо научили попздраве с овим наставком.

Ĉu vi vidas min?

Ne, mi ne vidas vin.

Kaj la sinjoron?

Jes, mi vidas la sinjoron.

Ĉu ŝi havas fraton?

Ne, sed mia amiko havas du fratojn kaj unu fratino.

Ĉu ili parolas Esperanton?

Ankoraŭ ne, ili lernas ĝin.

Kiu vidis mian unuan libron de Esperanto?

Mia kamaradino vidis ĝin.

Unu jaro havas 12 monatojn, 52 semajnojn kaj 365 tagojn.

-Да ли ме видиш (или видите)?

-Не, ја те (или вас) не видим.

-Не, не видим те (или вас).

-А господина?

-Да, (ја) видим господина.

-Да ли она има брата?

-Има ли она брата?

-Не, али мој пријатељ има два брата и једну сестру.

-Да ли они говоре есперанто?

-Говоре ли они есперанто?

-Још не, они га уче.

-Ко је видео моју прву есперантску књигу?

-Моја другарица је видела.

-Једна година има 12 месеци, 52 седмице и 365 дана.

∴

Прилози у есперанту су или без наставка (ankoraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, nun) или са наставком **-e**:

persono -особа, личност

lundo -понедељак

buŝo -уста

mallonga -кратак, а, о

persone -лично

lunde -понедељком

buŝe -усмено

mallonge -укратко

∴

Бориша Милићевић

(наставиће се)

Amuzo

Demandoj kaj respondoj

D: Kio havas multajn truojn, sed tamen entenas akvon?

R: Spongo.

D: Kio en aŭtomobila motoro servas al nenio, sed motoro sen ĝi ne funkcias?

R: Bruo.

D: Kial estas kontraŭleĝe homon kiu vivas en A sepulti en B?

R: Ĉar li ankoraŭ vivas.

D: Kiu monto estis la plej alta en la mondo antaŭ ol oni malkovris Mount Everest?

R: Ankaŭ tiam la plej alta monto estis Mount Everest.

D: Eskimoj estas tre bonaj ĉasistoj, sed ili neniam ĉasas pingvinojn. Kial?

R: Ĉar eskimoj vivas ĉe la norda kaj pingvinoj ĉe la suda poluso.

D: Ĉasisto eliris el tendo kaj iris rekte suden kvin kilometrojn. Tiam li turniĝis kaj iris rekte al oriento kvin kilometrojn. Fine, li denove turniĝis kaj iris rekte norden kvin kilometrojn. Tiam li vidis urson disŝirantan lian tendon. Kia estis la koloro de la urso?

R: Blanka, ĉar tio povis okazi nur ĉe la norda poluso (atentu la moviĝadon de la ĉasisto).

D: Kiajn ŝtonojn oni ne povas trovi en oceanoj?

R: Sekajn.

D: Kio estas en mezo de Munkeno?

R: Litero K.

D: Kio estas unufoje en minuto, dufoje en momento kaj tute ne en cent jaroj?

R: Litero M.

D: Kio estas tiel rompebla, ke eĉ elparolo de ĝia nomo rompas ĝin?

R: Silento.

D: La patrino de Jozefo havas kvar infanojn. La unua nomiĝas Aprilo, la dua Majo kaj la tria Junio. Kiel nomiĝas la kvara?

R: Jozefo.

Kompilis: Adem Jakupović

LERNEJAJ ŜERCOJ

Instruisto: Kio estas kvarco?

Lernanto: du co plus du co.

Instruisto: Kial vi ĉiun tagon malfruas?

Lernanto: Ĉar mi ĉiun tagon pasas preter la signo kun surskribo: „Malrapidu! Lernejo.“

Lernanto venis hejmen el la lernejo kaj diris al la patrino:

- Hodiaŭ la instruistino demandis min, ĉu mi havas fraton aŭ fratinnon.
- Kaj vi kompreneble respondis, ke vi ne havas.
- Jes, kaj ŝi diris: „Dank' al Dio.“

Instruisto: Vi malrapide skribas, malrapide kalkulas, malrapide legas. Ĉu eskzistas io, kion vi faras rapide?

Gelernantoj: Jes, ni rapide laciĝas.

Kompilis Adem Jakupović

In memoriam




LUDOVIKO SEKEREŜ

London, la 22-an de oktobro en Senta forpasis 80-jara fervojtrafika inĝeniero Ludoviko Sekereŝ, longjara aktivulo kaj funkciulo de fervojista Esperanto-movado. Li okupiĝis pri Esperanto ekde la jaro 1948 kaj intertempe okupis plurajn gravajn funkciojn en la nacia kaj internacia Esperanto-movado. Por la IFEF-kongreso en Maribor en la jaro 1971 en kunlaboro kun Josip Zupaniĉ li eldonis fakan terminaron en amplekso de 5.000 terminoj. Por sia aktiveco li ricevis du distingojn POR MERITOJ kaj plurajn diplomojn de diversaj Esperanto-organizaĵoj. Li estis membro de Esperanto-instituto en Beograd, de Terminara komisiono de IFEF kaj aŭtoro de pluraj fakaj tekstoj.

La forpaso de Ludoviko prezentas grandan perdon por la nacia kaj internacia E-movadoj.





La 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Roterdamo, Nederlando de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008

La 60-a kongreso de IFEF okazos en Poznań, Pollando de la 17-a ĝis la 24-a de majo 2008.

La 1-a kongreso de serbiaj esperantistoj okazos de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2008 en Niška Banja